

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

•
NACIA MEM-
KONFERENCO

•
POR PACA
KUNVIVADO!

•
BERTHELOT,
LA FONDINTO

•
NIAJ JUBILEULOJ

•
LINGVAJ
DEMANDOJ

•
NI RECENZAS

•
E-TREZOREJO
EN VIENO

•
KORRESPONDO
(novelo)

•
DISTROJ



Nacia jubilea MEM-konferenco

Granda evento en la agado de la bulgaraj esperantistoj-pacdefendantoj estis la Nacia Jubilea Konferenco de MEM, okazinta la 5-an de decembro pasintjare en Sofio. Tiun gravan iniciaton partoprenis pli ol 60 geesperantistoj el la tuta lando.

Antaŭ la komenco de la afereca laboro estis plenumita belarta programo, dediĉita al la paco, kiu kreis agrablan etoson.

En sia raporto pri la agado de la bulgaraj pacamantoj Dimitar Haĝiev, prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato, tuis la multflankajn aktivecojn de nia pacmovado. Ili estas vere multnombraj: pac-kunvenoj dediĉitaj al la Internacia Jaro de la Paco en multaj loĝlokoj, partopreno per prelegoj de elstaraj MEM-anoj en kunvenoj, scienc-praktikaj konferencoj, seminarioj, diversaj jubileoj, ĵurnalistaj renkontigoj, ISEU en Veliko Tŕrnovo ktp. D. Haĝiev menciis pri la eminenta agado de bulgaraj artistoj-esperantistoj, kies spektakloj kaj artaj plenumoj edukas la spektantojn en spirito de paco, amikeco kaj komprenigo. Li ne forgesis sciigi pri la senlaca laboro de la bulgaraj esperantistinoj, kiuj batalas por paco, por la feliĉa infaneco de siaj idoj, por suna kaj blua ĉielo. La arango de diversaj ekspozicioj kaj speciale tiuj de infanaj pentraĵoj, kie ĉeestis la porpaca temo estis bona kontribuo al la komuna, pacagado. La E-gazetaro — „Paco“, „La Pacaktivulo“, „Bulgara Esperantisto“, „Scienca Mondo“ — ankaŭ kontribuis, publikigante diversajn interesajn materialojn pri la monda pacmovado.

La internacia agado de la bulgaraj esperantistoj estis riĉa. Ili partoprenis la subskriban kampanojn sub la „Apelo el Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de la nukleaj armiloj“, lanĉita de la Internacia Komitato por Kolektado de Subskriboj en Tokio. Por ni estas granda honoro, ke ni kolektis pli ol 157 mil subskribojn sub tiu Apelo. Pri tio menciis ankaŭ la bulteno de tiu Komitato „Newsletter“. Dum la kampanjo la bulgaraj E-pacamantoj kunlaboris bonege kun la amasaj organizaĵoj — pacdefendaj komitatoj, Kom-somolo, Patrolanda Fronto ktp. Pli ol 9000 subskriboj estis prezentitaj al la Internacia Komitato por Kolektado de Subskriboj de bulgara delegitaro en julio 1987, kie la

bulgaraj esperantistoj ricevis altan agnoskon pri sia porpaca aktivado kontraŭ la nukleaj armiloj. Per prelegoj kaj aktivaj diskutoj bulgara delegitaro vizitis Vjetnamion lige kun la glora 30-jara jubileo de VPEA. MEM-anoj el Bulgario partoprenis la Tagojn de Paco kaj publikajn MEM-kunvenojn kadre de la UK en Aŭgsburgo, Pekino, Varsovio. Bulgaraj esperantistoj partoprenis la pacrenkontigon en Volgogrado 1986, en Pardubice k. a. Kun prelegoj pri la ideoj de paco, internacia komprenigo kaj amikeco gastis al la bulgaraj MEM-anoj elstaraj esperantistoj el eksterlando d-ro Imre Pethés, prezidanto de MEM, Clément Tholet, ĝenerala sekretario de MEM, d-ro Detlev Blanke, ĉefsekretario de la Esperanto-Asocio de GDR k. a. Infanoj-esperantistoj el kelkaj landoj partoprenis la Internacian Infanan Asembleon „Standardo de la Paco“ en Sofio, amikiĝis kun bulgaraj infanoj. Infana E-delegitaro el fora Japanio ankaŭ gastis al bulgaraj esperantistoj. Prof. K. Popov, vicprezidanto de UMEA, proponis, ke oni okazigu diskutojn pri la paco ĉirkaŭ la Ronda Tablo. Li informis, ke la medicinistoj-esperantistoj en sia jubilea konferenco en Krakovo 1987, konfirmis sian fundamentan penson: „La homan sanon oni povas konservi nur en pacaĵ kondiĉoj“.

Belka Beleva, prezidantino de la Virina Komisiono ĉe BEA, emociie deklaris, ke la bulgaraj esperantistinoj subtenos la batalon de la abnegaciaj britaj pacdefendantinoj ĉe la militbazo en Greenham Common per ĉenletero, en kiu la ĉefa moto estas „Virinoj postulas pacon por la mondo“. La instruistino Ganka Boĉukova, kiu vizitis Japanion somere de 1987 kaj kune kun siaj du gekolegoj transdonis pli ol 9000 mil subskribojn al la Internacia Packomitato en Tokio, emociie rakontis pri siaj neforgeblaj renkontigoj kun la japanaj pacbatalantoj. Ŝi proponis, ke oni arangu porpacan ekspozicion de pentraĵoj de japanaj kaj bulgaraj infanoj. Hristo Manolov el Polski Trâmbeŝ informis fiere pri la sindona laboro de la esperantistoj en lia urbo kaj en V. Tŕrnovo, dank' al kiuj estis subskribita en 1986 kontrakto pri kunlaboro inter la pacdefendaj komitatoj en V. Tŕrnovo kaj Lieĝo, Belgio. Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, proponis organizon de nacia pacmarŝo tra la tuta lando en 1988.

La elstara esperantisto-veterano Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM, proponis la novan estraron de Bulgara MEM-Sekcio: Dimitar Haĝiev — prezidanto, Vasja Cvetkova — sekretario, Canko Murgin, Veneta Baleva, Fani Miĥajlova, Ljubomir Trifonĉovski kaj Evgeni Georgiev. Ni bondeziras al ili novajn sukcesojn en ilia nobla porpaca agado.

La distingigitaj en la subskriba kampanjo esperantistoj estis honoritaj per libroj. Samtempe N. Aleksiev alvokis la bulgarajn MEM-anojn partopreni la XI Ĝeneralan Konferencon en Budapeŝto en aprilo ĉi-jare.

En sia parolado la prezidanto de BEA Sava Dŕlbokov substrekiis, ke la konferenco estas tre grava momento en nia Esperanto-agado. „Nia tasko estas — li diris, — diskonigi al la mondo la porpacan laboron de la bulgaraj esperantistoj, la atingojn de nia popolo. Tio estas bonega kontribuo en la komuna batalo por paco. S. Dŕlbokov alvokis la bulgarajn esperantistojn labori daŭre, fervore kaj sindone, por sennuklea paca mondo.

Vasja CVETKOVA,
Sekretario de MEM



KOMUNE — POR PACA MONDO KAJ KUNVIVADO!



Miĥail Gorbaĉov kaj Ronald Reagan post subskribo de la Kontrakto.

En decembro 1987 en Vaŝingtono, Usono, okazis renkontiĝo sur plej alta nivelo — inter la Ĝenerala Sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio MIĤAIL GORBAĈOV kaj la Prezidento de Usono RONALD REAGAN, kiuj la 8-an de decembro subskribis unikan dokumenton kun tre grava signifo por ĉiuj popoloj sur nia planedo: Kontrakto por neniigo de la nukleaj mez- kaj malpli granddistancaj raketoj. Estas farita la unua reala grava paŝo al ĝenerala malarmado, al tutmonda paca konekzistado de popoloj kun malsamaj soci-politikaj konceptoj. Tiun paŝon ĉiuj homoj sur la Tero arde salutas kaj aprobas, plenaj de espero pri feliĉa estonto en paca mondo.

Dum sia restado en Vaŝingtono Miĥail Gorbaĉov havis multajn renkontiĝojn kun reprezentantoj de la afercaj medioj, de la plej gravaj amaskomunikiloj, eldonejoj k. a. Ĉi-sube ni publikigas fragmentojn el lia parolado dum la renkontiĝo kun eminentaj sociagantoj kaj reprezentantoj de la scienco, kulturo kaj arto en Usono.

... Nun ni atingis tian gravan momenton, kiam sur niajn ŝultrojn, precipe sur la ŝultrojn de la politikistoj, kuŝiĝis la respondeco plene esprimi la volon de la popolamasoj profite al

la proksimiĝo, al plibonigo de la interrilatoj. Ŝajnas al mi tre grave, ke ĝuste tiu kompreno estiĝu la bazo ĉe la kreado de niaj novaj interrilatoj.

Ni ĉiuj estas infanoj de nia tempo, sed ekzistas novaj realaĵoj kaj ili diktis novajn imperativojn — tio, kion ni nomas provokon de la tempo. La akumulita sperto estas nia riĉaĵo, se ni ĝuste uzas ĝin.

Mi opinias, ke se ni ĉiuj — kaj ni, kaj vi en Usono, ne komprenos tion, por la mondo estos tre malfacile transiri sur la novan vojon de plibonigo de la internaciaj rilatoj kaj de kunlaborado. Ni ĉiuj scias, kiel tiu neceso jam estas sentata ĉirkaŭ ni! Ĝi frapas sur la fenestrojn — la usonajn kaj la sovetajn, — kaj ni ne devas resti surdaj pri tio, kio jam maturiĝis.

Tiaj estas la novaj realaĵoj. Sajne, ni kaptis ilin, sed eble ne ĉion funde komprenis. Ni penis kompreni ilian plej gravan sencon kaj metis ilin en la bazon de nia nova analizo kaj kompreno de la nuntempa mondo.

Ni estas interligitaj — per la scienco kaj la tekniko, per la ekologio, per la komunaj minacoj, kiuj konstante kreskas kaj diktas unuigon de niaj pensoj kaj agoj. Kaj ĉu ne estas devo de la intelektularo konigi tiun komprenon al la popoloj? Mi opinias, ke tio estas ĝia devo.

Por tio ni estas pretaj praktiki ne nur interŝanĝojn, sed ankaŭ kunlaboradon, organizi renkontiĝojn por kune pritaksi la situacion el tuthomara pozicio.

Mi ne opinias, ke nin devas konfuzi la fakto, ke ni estas diversaj. Prenu kiun ajn familion. Ja en unu familio ofte vivas tre diversaj homoj. Kaj se temas pri la internacia asocio — kial ĝi povas esti sen diferencoj? Tio estas la plej rimarkinda fenomeno: ni ĉiuj estas diversaj kaj samtempe ni prezentas unusolan civilizacion. Cio estas interligita. Ni estas diversaj, sed ni estas en unu mondo kaj ni devas pensi antaŭ ĉio pri la grandega kontribuo, kiun ni — Sovetunio kaj Usono — povas realigi el vidpunkto de kompreno de la novaj realaĵoj, kiamaniere ni povas helpi la reorganizon de la interrilatoj, antaŭ ĉio inter niaj landoj.

Mi, ekzemple, ne povas kompreni tiujn homojn, kiuj renkontis malamike la elementojn de kunlaborado kaj interkompreno, elmontrigintaj ĉe preparo de la Kontrakto pri mezdistancaj kaj malpli granddistancaj raketoj. El homa vidpunkto, por mi tio estas nekomprenebla. Kvankam ĝi estas komprenebla — la intereso diktas ĝin. Cio estas klarigebla per la intereso. Sed la intereso povas esti tre diversaj. Estas intereso de la popolamasoj — usonaj kaj sovetiaj — ili estas altaj intereso. Kaj la tasko de la politikistoj estas esprimi ĝuste tiujn interesojn, sed ne la egoismajn interesojn de apartaj grupoj kaj tavoloj en tiu aŭ alia socio.

Ni ne pretendas esti la lasta instanco pri la vero en ĉiuj problemoj, sed ni estas pretaj doni nian kontribuon, ni disponas pri fortoj, kapablaj partopreni la proceson de kompreno de la mondo kaj en la kreado de novaj interrilatoj. Al mi ŝajnas, ke la eblecoj de niaj du landoj tiurilate estas grandegaj.

Ni komencis la renovigon, ĉar ni bezonas ĝin. Ni ne povis vivi, kiel ni vivis ĝis nun.

Ni provis pritaksi la staton de nia socio komplete kaj ni venis al la ĉefa konkludo: oni ne utiligas la potencialon de la socialisma sociordo, tion, kion ĝi kapablas doni ne nur el vidpunkto de la homa faktoro, sed ankaŭ el vidpunkto de manovrado per la plana ekonomio. Kaj ni okupigis pri nia socio, celante ekkoni ĝin, nin mem, kompreni la esencon de la socio, en kiu ni vivas. Por tio ni eksentis la bezonon de publikeco, de demokratio.

La serĉadoj estas malfacilaj. Ni ankoraŭ ne ĉion diris, ankoraŭ ne trovis la solvon de ĉiuj problemoj. Sed ni komprenis la ĉefan aferon kaj tiu ĉefaĵo kuŝas en la bazo de nia politiko de renovigo. Alivorte, dum du kaj duono da jaroj ni elfaris nian vidpunkton pri la socio, en kiu ni vivas kaj provis ĵeti rigardon en la estonton, al la vojo, laŭ kiu ni devas iri. Kaj ni ekiris antaŭen.

Nature, nia nova pensmaniero rilate la internajn procesojn en nia lando kaj nia alpaŝo al ili manifestiĝas ankaŭ en nia kompreno pri la mondo ĝenerale, al niaj interrilatoj kun tiu ĉi mondo. Ni opinias, ke la internaciaj rilatoj ankaŭ bezonas „renovigon“, sed ni ne povas trudi ĝin per „decido de KPSU“. Tio devas esti rezulto de interkonsento de la tutmonda komunafajo, de la interagado de ĉiuj ĝiaj konsistopartoj. Ni estas pretaj por dialogo, por komparo de konceptoj, interŝanĝoj, ni estimas la valoradojn kaj la elekton de ĉiu popolo.

Venis la tempo, kiam vere oni devas ĉion pripensi — kien ni atingis, al kiu etapo ni leviĝis, tiri la konkludojn kaj eble ankoraŭ 10, 20, 30, eĉ 100 fojojn renkontigi por finfine decidi, kiel plu vivi en tiu ĉi mondo. Tiu ĉi problemo koncernas niajn du popolojn kaj ankaŭ ĉiujn aliajn popolojn. Usono kaj Sovetunio devas trovi manieron kunlabori, interproksimigi kaj estonte ankaŭ amikiĝi. Ni ne rapidos, ne falos en eŭforion, konsciante nian respondecon. Ni ne bezonas iluziojn, ĉar ja ekzistas obstinaj realaĵoj. Sed tamen ni devas komenci: ja ĉio komenciĝas per la unua paŝo.

Se tiu ĉi vizito kaj tio, kio ekĝermis dum la lastaj jaroj en niaj interrilatoj, sin nutras per la nuna stato de la publika opinio, kaj se ĝi moviĝas laŭ la sama direkto, do, mi opinias, ke la glacio rompiĝis. Mi persone estas optimisto.

(El la parolado de Miĥail Gorbaĉov, „La konstruado de la internaciaj rilatoj — komuna faro“ „Pravda“, 10. 12. 87)

„Berthelot, la fondinto



Pasintsomere, en julio 1987, finiĝis 82 jaroj de la apero de l'unua numero de revuo, Esperanto "kaj aperis ĝia 80-a jarkolekto. Omage al tiu datreveno ĉi-sube ni donas lokon al la artikolo „Berthelot, la fondinto“.

„BE“

Mallonga sed kompleksa kaj riĉa je paradoksoj estis la vivo de Paul Berthelot. Li estis eksterleĝa filo de Paul Bert (1833—1886), fama scienculo kaj politikisto, iama franca ministro pri publika instruado. Sed, kiam Paul Berthelot naskiĝis, la 26-an de julio 1881, en Auxerre (Francio), la loka bakisto Paul Berthelot — do samnoma — deklaris lin sia laŭleĝa filo. La knabeto ricevis la antaŭnomojn Paul kaj Marcel, el kiuj li poste la unuan uzis kiel voknomon, kaj la duan en sia pseŭdonimo Marcelo Verema.

Berthelot iam konfesis, ke dum tuta sia vivo li provis sin difini, daŭre serĉante sian vojon, neniam bone sin sentante en sia propra haŭto. Diversaj ideologioj kaj filozofioj forte altiris lin: spiritismo, determinismo, socialismo kaj fine anarkismo. Flame kaj idealiste li ĉiam defendis siajn opiniojn (ilin metante super ĉio): „La es-primio sincera de miaj ideoj estas al mi pli kara ol ia ajn konsidero“.

Komence de 1906 Berthelot definitive forlasis Francion por iri al Genevo, laŭdire, por helpi la preparadon de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto, sed, pli probable,

por spiri la por li pli „puran“ aeron de neŭtrala lando. Li tie eldonis „rondirantan folieton por kreado de tutmonda *Socia Revuo*“. Tri el la kvar numeroj li redaktis. La „folieto“ fariĝis *Internacia Socia Revuo*, kiu ekaperis en 1907 kiel la unua klasbatala revuo en Esperanto. Dum la 2-a Universala Kongreso Berthelot aranĝis la unuan kongreson de „verdruĝuloj“. Post la kongreso li vojaĝis al Portugalio kaj poste al Argentino kaj Urugvajo, por fine ekloĝi en Brazilo.

En Goias (Brazilo) Berthelot provis starigi diversnacionan komunisman komunumon, sed la entrepreno baldaŭ fiaskis. Persekutata de la aŭtoritatoj, perfidita de siaj kunuloj, priŝtelita kaj ĉifonvestita, grave malsana pro ftizo, eksciinte pri ekzisto de katolika misio de francaj dominikanoj en la brazila ĝangalo, Berthelot pene vojaĝis tien.

En majo 1910, li kuraĝis frapi ĉe la pordo de la misiistoj petante loĝadon por la „kelkaj vivotagoj, kiuj restis al li“.

Malgraŭ siaj gravaj psikaj suferoj, Berthelot ankaŭ tie laboris por Esperanto kompilante kun la dominikanoj la unuan gramatikon en la la-

tina lingvo „Compendium grammaticae Esperanto“, kiu neniam aperis. Al la dominikanoj li diris: „Kiam vi anoncos mian morton, diru al ili (la esperantistoj), ke mi multe laboris.“

Berthelot mortis ĉe la dominikanoj en la misio de Conceição do Araguaia (Brazilo) la 2-an de novembro 1910.

Sian veran identecon li ĉiam volis kaŝi² kaj al la dominikanoj li kutimis diri: „Antaŭ ol morti, mi rivelos al vi kiu mi estas.“ Fakte, nur post anonco de lia morto al la franca ambasado, la dominikanoj eksciis, ke li estis filo de Paul Bert.

Ni klopodu nun ĵeti iom pli da lumo al Berthelot kiel esperantisto kaj al lia aktiveco en la Esperanto-movado. Post brilaj studoj en la liceo de Reims, Berthelot daŭrigis la studadon en Parizo. Tie profesoris pri matematiko la fame konata gvidanto de la Esperanto-movado Carlo Bourlet. Jen kiel en *La Revuo*, n-ro 8(56) de aprilo 1911, estis resumita per la plumo de Bourlet la forta personeco de Berthelot:

„Kiam, en oktobro 1901, mi revenis al mia klaso, mi kun plezuro ekvidis sur la unua benko mian junan samideanon. Malofte, dum mia jam longa profesorado, mi renkontis junulon pli inteligentan, sed ankaŭ pli fantazian. Li kun mirinda facileco lernis matematikon kaj cetere ĉion, kion li volis lerni. Sed

li nur lernis tion, kio al li plaĉis, kaj neniu forto en la mondo, neniu rezono estus povinta lin devigi studi ion, eĉ necesegan, kio lin ne allogis. En julio 1902 li prezentigis al la ekzameno por eniro en la Politeknikan Lernejon. Mi tre esperis, ke malgraŭ sia neregula laborado, li tamen, pro siaj grandaj kapabloj en matematiko, estos akceptita. Li senpene transpaŝis la unuan parton, sed dum la dua fina parto, en la ĉefa ekzameno pri matematiko, li vigle kontraŭdiskutis sian ekzameniston. Li cetere estis prava kaj la ekzamenisto malprava. Tion malfacile oni pardonas al kandidato: Berthelot ne estis akceptita."

Varbita de samlerneĵano en la liceo de Reims, Berthelot esperantistigis en 1899 kaj ricevis la numeron 4874 en la *Adresaro de la esperantistoj* de d-ro Zamenhof. La lingvon li lernis ĝisfunde. Flame kaj entuziasme li propagandis ĝin.

Alveninte en Céret kaj, dum ĝisgiginte ĉe presisto, li, kiel tiuj provis ariĝi la katalunajn esperantistojn loĝantajn en la hispana kaj franca flankoj de Pireneoj, en unu sola kataluna asocio. En decembro 1904, li fondis la „Aplech Esperantista de Catalunya“ (Kataluna Esperantista Grupo), kiu celis diskonigi Esperanton pere de la kataluna lingvo. Ĝia organo fariĝis *Espero de Katalunjo* (aperis nur kelkaj numeroj), presita de Berthelot

mem, la unua Esperanta gazeto aperinta en la kataluna lingvo. Notinde estas, ke la unuan, plurpaĝan, ĉefartikolon verkis Salvador Dali, la patro de la nuntempe fame konata pentristo.

La unua ĝenerala kunveno de la grupo okazis en Barcelono la 24-an de aprilo 1905. Krom diversaj delegitoj el ambaŭ flankoj de Pireneoj ĉeestis ankaŭ Emile Boirac, rektoro de la Universitato de Dijon, kiu poste, ĝis sia morto en 1917, estis prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj de ĝia Lingva Komitato.

La 18-an de junio 1905 Berthelot aperigis la unuan numeron de *Esperanto*, kiu estis presita en Perpignan, sed la ceteraj, fare de Berthelot mem, en Céret. Duonmonata, kvarpaĝa (du en Esperanto kaj du en la franca lingvo), en formato 33×50 cm, la revuo estis redaktata de Charles Lambert, universitata profesoro en Dijon; la administradon kaj presadon prizorgis Berthelot, ĝia proprietulo. La nova periodaĵo estis primovada kaj bone akceptita; ĝi estis ne nur abonebla, sed ankaŭ „aĉetebla en ĉiuj francaj kaj svisaj stacidomoj“. Jen letero de d-ro Zamenhof, presita en la dua numero de la nova gazeto:

„Kara Sinjoro, Mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto „Esperanto“ kaj mi dankas Vin kore. Mi legis la numeron kun plezuro kaj granda intereso. Mi deziras al Via

entreveno la plej bonan sukceson. Via, L. Zamenhof“.

En la sama — dua — numero de la gazeto, Berthelot ekpublikigis sian „Vortareto Esperanto-Esperanta“, la unuan provon de vortaro tute en Esperanto.

Transloĝiginte al Genevo, Berthelot pene daŭrigis la eldonadon de la gazeto. Ĝi tiam estis presata en Bellegarde (Ain, Francio), sed, pro financaj, administraj malhelpoj kaj bojkotado, Berthelot cedis sian gazeton al Hector Hodler. La 12-an de februaro 1907 reaperis *Esperanto*, kies nova direktoro estis Hodler. Por la unua fojo, krom kvarlingva ĉefartikolo, ĝi havis tekston tute en Esperanto — signo nekontestebla de ĝia jama universaleco.

Je la fondiĝo de UEA, en 1908, *Esperanto* fariĝis ĝia oficiala organo.

Suldaĵ ni estas al Paul Berthelot. Li meritis, ke ni pli bone konu liajn ĝis nun nedankitajn servojn por Esperanto.

Por „Esperanto“ kunlabore verkis Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux

1) „La Homo Libera en Nacio Libera“ de Marcelo Verema en „Internacia Socia Revuo“, de januaro 1908, represita en „Espero“ Pacifista“ de marto/junio 1908.

2) Kiam li plenigis la demandaron por esti membro de la Lingva Komitato, kiel naskiĝdaton li eĉ skribis: Majo 1882. Li estis nomita membro de la Lingva Komitato en julio 1909.

Internacia koresponda adresaro

Se vi volas (eble denove) publikigian adreson en la koresponda adresaro, daŭre kompilata de la Esperanto-Klubo en Liberec (Poŝtkesto 194, CS-460 01 LIBEREC, Ĉeĥoslovakio), tiukaze vi devas varbi du novajn membrojn por la korespondantaro. Vi povas mem multobligi aliĝilojn tajpe aŭ alie — nura kondiĉo estas, ke ili enhavu la sekvajn ru-

brikojn: nomo de la rekomdanto, familia kaj voknomo de la korespondemulo, strato kaj n-ro, urbo (loko) kun poŝta kodo, lando kaj kontinento, korespondtemoj, hobiaj, lingvoj konataj plene kaj parte, profesio, naskiĝjaro. Skribu daton, subskribu kaj sendu ĝin al la ĉi-supre montrita adresaro.

El „Budapeŝta Informilo“ n-ro 10/1987

PROF. GUGEŬ 85-JARA

La 16-an de decembro 1987 en la Palaco de Kulturo en Sofio kunvenis multaj esperantistoj por celebri du gravajn jubileojn — la 100-jariĝon de la Internacia Lingvo Esperanto kaj la 85-jariĝon de profesoro doktoro Stojan Guĝev — elstara bulgara kaj mondkonata esperantisto. La solenaĵon ĉeestis la prezidanto de CE de BEA Sava Dălbokov, ĝia vicprezidanto Petăr Todorov kaj la ĝenerala sekretario Dimităr Papazov, la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Dončo Hitrov kaj aliaj estraranoj. Starante, la ĉeestantoj per ŝtormaj aplaŭdoj salutis la jubileulon, kiu koncize, sed tre interese parolis pri la Internacia Lingvo — „lingvo de paco kaj amikeco“.

Salutparoladon pri Esperanto kaj pri prof. Guĝev faris la prezidanto de UE de BEA — prof. d-ro Kiril Popov.

Prof. d-ro Stojan Guĝev naskiĝis la 19-an de decembro 1902 en urbo Pazarĝik. Li fariĝis esperantisto tre juna, nur 15-jaraĝa kaj dum sia tuta vivo ne ĉesis agi en la landa kaj internacia Esperanto-movado. Li iniciatis kaj fondis E-societon „Sredna Gora“ en urbo Panagjuriŝte kaj poste ankaŭ en Pazarĝik. Li organizis en Bulgario la unuan junularan kongreson en 1921, tradukis verkojn de Penčo Slavejkov, Javorov, Debeljanov, Jovkov, Nikolaj Rajnov. Vigle li agis en Parizo dum sia studado. En 1945–1946 jaro Guĝev estis ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Dek jarojn li estis prezidanto de BEA. Ekde 1967 li estis membro kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Li kunlaboris ĉe la organigo de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino kaj estas ĝia vicprezidanto.

Detale pri la scienca agado de la jubileulo parolis prof. Elena Stoin el la Bulgara Akademio de Sciencoj. „Rimarkinda estas la energio — diris ŝi — per kiu prof. Guĝev laboris en la Muzika Akademio. Pro liaj meritoj en la disvolviĝo de la bulgara muzikscienco kaj muzikpedagogio, pro lia grandega kontribuo al la muzika kulturo de nia popolo prof. Guĝev estis honorita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I-a grado (okaze de lia 70-jariĝo) kaj estas Laŭreato de Dimitrov-premio. La verkoj de prof. Guĝev superas 3000 presitajn paĝojn, al ili oni devas aldoni ĉirkaŭ 300 artikolojn, parto de kiuj havas la karakteron de sciencaj studoj. Ni notu lian 7-voluman „Teorio de la bulgara popolmuziko“, „Bulgara popola dancarto“, „Ritmo kaj takto en la bulgara popolmuziko“.

Sekvis salutparoloj kaj prezento de donacoj al la jubileulo en la nomo de CE de BEA, de artistoj — Belka Beleva, de esperantistoj

el Plovdiv — Fani Miĥajlova, el Ĥaskovo — N. Uzunov, Pazarĝik, Panagjuriŝte ktp. La gvidantino de la solenaĵo Nevjana Krăsteva tralegis salutleteron de N. Aleksiev. Per varmaj vortoj kaj freŝaj floroj oni kortuŝe gratulis la jubileulon. Riĉa kaj altnivela literatura-muzika programo, plenumita de artistoj, amatoroj kaj eksstudentoj de prof. Guĝev, kiuj nun mem estas docentoj kaj profesoroj en la Muzika Akademio, kronis la feston.

Ljubka MANDALOVA

GRATULOJN, AMIKO PILEV!

La 14-an de oktobro 1987 la prezidanto de DE de BEA en Ĥaskovo Nikola Pilev fariĝis kvindekjara.

Pilev naskiĝis en v. Gorski izvor, distrikto de Ĥaskovo. Fininte la Superan Ekonomian Instituton en Varna, li estis sinsekve kunlaboranto en la Komunuma Komitato de BKP, vicprezidanto de la Urba Konsilantaro, direktoro de Bulgara Nacia Banko, kaj nun li laboras kiel ĉefspecialisto en Ekonomia fako ĉe la Distrikta Konsilantaro — Ĥaskovo.

Dum pluraj jaroj Pilev aktive laboras por la disvastigo de Esperanto. Malgraŭ sia okupiteco pri soci-politika agado, li estis prezidanto de la Urba Esperanto-societo „Asen Zlatarov“ en Ĥaskovo kaj ekde 1984 estas prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA.

Kun la nomo de Pilev estas ligitaj la plej gravaj sukcesoj de Esperanto en Ĥaskovo-regiono. Ni mencias nur kelkajn el ili, ekzemple la okazigon de naciaj revuoj de Esperanta parolo kaj kanto en Ĥaskovo (1969 kaj 1985), solenaj celebroy lige kun la jubileoj de E-societoj en la distrikto de Ĥaskovo. Li certigis rimedojn por aĉeto en la urbocentro de ejo por Esperanta Kulturdomo. Lia merito estas la kreo kaj funkciigo de la Esperanto-entrepreno „Globus“ — Ĥaskovo, la fondo de Belarta Urba Klubo, la eldono de la verskolekto „Homoj, antaŭen!“ de Penju Penev kaj de la baldaŭ aperonta libro „Nesto de birdoj“, kiu enhavas poeziajn kaj prozajn verkojn de aŭtoroj el Ĥaskovo-regiono. Li verkis originalan Esperantan poezion kaj historian skizon pri la Esperanta movado en nia distrikto.

Pilev dediĉis pli ol 25 jarojn de sia vivo al Esperanto. Starante ĉiam proksime de la problemoj, atentema kaj afabla, li estas vera ekzemplo de sindonemo al nia movado.

Ni elkore gratulas nian amikon Nikola Pilev okaze de lia 50-jara jubileo kaj bondeziras al li multe da sano, feliĉo kaj sukcesoj en lia nobla agado sur la Esperanto-kampoj!

Penjo STOJANOV

PRI LA NOMADO DE GENTOJ KAJ LANDOJ

Bernard GOLDEN

En unu el miaj artikoloj pri la eterna landnoma problemo en Esperanto mi proponis, ke anstataŭ „okcidentgermano“ kaj „orientgermano“ aŭ la strangaj „West-Germano“ kaj „East-Germano“, kiuj estis proponitaj de A. Albault, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, oni uzu akronimojn¹ por akiri pli simplajn kaj mallongajn nomformojn. Kiel modelo estas uzebla la landnomo Usono, formita per la vortinicialoj en la anglalingva titolo *United States of North America (Usona)*, kiu estis esperantigita jam en 1907 kiel Usono. Nekontestebla estas la avantaĝo uzi tiun kvinlitteran nomon anstataŭ la plenan nomon de la lando — Unuigintaj Statoj de Nordameriko.

Mi elpensis du manierojn nomi sammaniere ambaŭ germanajn statojn kaj iliajn enloĝantojn. Kutimaj esperantaj sigloj de Federa Respubliko de Germanio kaj Germana Demokratia Respubliko estas FRG kaj GDR respektive. Se oni prononcas la literojn de la du sigloj F-R-G kaj G-D-R, oni ricevas la landnomojn Forogo kaj Godoro; sekve, la enloĝantoj estas foroganoj kaj godoranoj. Mi scias, ke „Godoro“ kaj „godoranoj“ estas uzataj de tiaj esperantistoj, almenaŭ en la parola lingvo. Male, ĝis nun mi ne registris la formojn „Forogo“ kaj „forogano“. Antaŭ ol mi havis tempon profunde esplori la demandojn, alvenis „severa“ protesto de forogano, kiu insistis, ke li estas „germano (el FR Germanio) kaj nenio alia“.

Mi demandis min, ĉu frue en tiu ĉi jarcento, kiam iu ingena esperantisto proponis „Usono“ kaj „usonano“, aŭdiĝis simila protesto ĉe la okcidenta bordo de Atlantiko? Se tio okazis, estas evidente, ke ĝi havis nenian efikon. La land- kaj landan-nomo firme enradikiĝis tutsimple, ĉar ili estis uzataj de esperantistoj. Jen la tikla demando: kiu vere posedas la povon aŭ rajton krei tiajn nomojn kaj enkonduki ilin en la Esperantan leksikon?

Kiam Dio donis al Adamo la taskon nomi „ĉiujn bestojn de la kampo kaj ĉiujn birdojn de la ĉielo“, ne okazis diskuto inter tiuj ĉi kaj la nomdono pri la ĝustaj nomoj. Adamo agis arbitre, sed tre efike. Bedaŭrinde, Esperantujo ne estas Edeno, do la donado de nomoj al dupiedaj bestoj parolantaj internacian lingvon kaŭzas ne malmultajn kapdolorojn al la verdaĵo adamidoj. Iu proponas landnomon, surbaze de kiu formiĝas la nomo de la landano per la sufikso „-an“. Alia anatemas tiun procedon kaj baptas la genton unue. Ekzemplo de tia diferenco de opinioj estas la propono de Akademia prezidanto Albault, ke azia lando nomiĝu „Koreo“ kaj la landanoj „koreanoj“, malgraŭ la vigla protesto de esperantistoj en tiu lando, kiuj nomas sin koreoj. Estos interese vidi, kies volo superregos — tiu de la prezidanto de la

Akademio aŭ tiu de esperantistoj loĝantaj en Koreujo/Koreio.

Eĉ la tradicio estas surtretita de homoj, kiuj opinias, ke ili scias pli bone nomi landon kaj popolon ol la aŭtoro de Esperanto kaj pluraj generacioj da esperantistoj. Ekde la verda zamenhofa epoko, la kimroj paradize loĝis en lando, kies Esperanta nomo devenas de la etnolingva formo de la gentnomo: *Cymro* — kimro, *Cymru* — Kimrujo. En 1971 J. Kavka, la ĉefredaktoro de *Poŝatlaso de la Mondo*, decidis, ke la lando devas nomiĝi Valeso kaj la loĝantoj valesanoj. Kompreneble, li ne konsultis la kimrojn, antaŭ ol li faris tiun arbitran nomŝanĝon. Kvankam la registro de Valeso en *Poŝatlaso* okazis antaŭ jardeko kaj duono, ĝia efiko estis tute nula, kaj kimroj kaj ne-kimroj daŭre parolas pri Kimrujo.

A. Albault refoje elpaŝis sur la scenejon, kiam li proponis la transbaptan de du gentoj, la portugaloj kaj la litovoj. Lia nova nomo por la unua nacio estas portugoj kaj por la dua lituanoj. Redakciaj de *Horizonto* de Soveta Litovio, en akre vortigita pamfleta rebato kontraŭ Albault, defendis la ĝis nun uzatan nomon de sia patrolando, Litovio. Sed la samaj redakciaj havas sian propran obsedan nocion pri la formado de land- kaj landan-nomoj: neniu popolnomo havu la sufiksajn finaĵojn „-an“. Sekve de tiu rezonado, ili parolas pri la braziloj, aŭstraloj kaj kolumboj! Ĉi-lasto nomo estas vera bizararo. La membroj de la litova toponimia skolo rifuzas akcepti, ke la loĝantoj de la sudamerika lando Kolombio (hispane *Colombia*) estu nomataj kolombianoj (hispane *colombianos*) — sed forigo de la sufikso donas la nomformon „kolomboj“! Ankaŭ la litovoj scias, ke birdoj ne estas la ŝtatanoj de Kolombio, do ili facilanime transbaptis ilin per la nomo „kolumboj“!

Ankoraŭ unu problemo temas pri „ukrajno/ukraino“ (ne estas akordo eĉ pri ortografio). En unu tendaro Ukraino/Ukraino estas la nomo de la lando, kie loĝas ukrainanoj/ukrainanoj; en la alia tendaro la popolo nomata ukrainoj/ukrainoj loĝas en Ukrainio/Ukrainio.

Dum kelkaj esperantistoj pridiskutas la diversajn temojn sur teoria nivelo en siaj eburaj turoj, aliaj esperantistoj, parolante kaj skribante, devas uzi nomojn de landoj kaj landanoj. Ne estas tempo atendi oficialajn decidojn. Cetere, se Akademia aŭ alispeca aŭtoritata deklaro ne konformas al la lingvouzo, ĝi malfacile povos devigi akcepton. La plej ofte uzataj nomformoj enradikiĝas, kaj tiuj, kiuj ne sukcesas, falos en la abismon de forgeso.

Ankoraŭ ne aperis en Esperantujo iuspeca lingvopapo kun senlima povo, kiu kapablos devigi universalan akcepton de nomformoj. Sekve, ne estas atentebla baldaŭa solvo de la t.n. landnoma problemo. Ankaŭ la Akademio de Esperanto konstatis, ke estas tre malfacile akordigi la diversajn konfliktaĵajn principojn pri la formado de gent- kaj landnomoj, do ne okazos plua oficialigo de tiaj nomoj.

1) Akronimo — vorto aŭ nomo, konsistanta el la inicialoj aŭ unuaj silaboj de plurvorta nomo aŭ esprimo.

KOMPARO DE LA PROJEKTO PRI „MONDA SKRIBO“ KUN ESPERANTO

En la rubriko „Teorio“ de n-ro 8/1987 de „Stenografski pregled“ (Stenografia Revuo), monata scienca-metodika revuo (eldonata de la Ministerio de Popola Klerigo, Centra Komitato de la Unuiĝo de Bulgaraj

Instruistoj, Nacia Konsilio pri Stenografio kaj Tajpado kaj de la Stata Instituto pri Stenografio) estas aperigita artikolo titolita „Projekto pri „Monda Skribo“. Ĝia aŭtoro estas Stefan Banov, elstara bulgara teoriis-

to pri stenografio, eksa supera lektoro de stenografio en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“, aŭtoro de propra bulgara stenografia sistemo kaj de projekto pri nova racia skribo por vasta uzo, havanta universalan karakteron.

En la artikolo estas priskribita kaj kritike analizita la universala skribsistemo „Monda Skribo“, kies aŭtoroj estas la francoj Jean Efel, lia frato Michel Legen, fama pentristo-karikaturisto kaj prof. Louis Basin, fakulo pri vivantaj orientaj lingvoj. Tiu ĉi sistemo estas pazigrafia kaj konsistas el piktogramaj signoj kaj internacie akceptitaj signoj kiel la ciferoj, la matematikaj, kemiaj, geografiaj, vojaĵaj kaj aliaj signoj, el kiuj per unutipaj gramatikaj reguloj estas formataj derivitaj vortoj. Laŭ ĝiaj aŭtoroj la sistemo estas universala rimedo, per kiu homoj konantaj eĉ ne unu hind-eŭropan lingvon povos kompreni unuj la aliajn. Ĝi eĉ estas nomita de la aŭtoroj nova internacia „lingvo“.

Tio, kio estas interesa kaj grava en la artikolo por ni esperantistoj estas la komparoj inter la menciita projekto pri „Monda Skribo“ kaj Esperanto, favoraj por nia lingvo, ĉar per ili Banov karakterizas ĝin tute pozitive. Banov komparas la projekton pri „Mon-

da Skribo“ kun Esperanto, ĉar ĝiaj kreintoj asertas, ke ĝi estas nova universala „lingvo“, kiu estas facile kaj tre rapide ellernebla. Banov konkludas, ke „Mal-facile estas taksu ĉu tiu ĉi „lingvo“ estas ellernebla pli facile kaj pli rapide ol Esperanto“ kaj aldonas: „Sed unu afero estas certa — pere de Esperanto oni povas paroli, interkomunikigi kaj verki same kiel en ĉiu alia lingvo, dum en la projekto pri monda skribo mankas la necesa precizeco kaj konkreta esprimo de la pensoj“. Notante, ke Esperanto havas „simpligitajn principojn, pruntitajn el la eŭropaj lingvoj kaj minimuman vortaran provizon“, Banov esprimas la opinion, ke „Sur tiuj ĉi principoj konstrueblus ia monda skribo de du-signifa logiko, kun malmulte da reguloj sen esceptoj kaj ĉe la apliko de spriteco“. Li konsideras tamen, ke la ebleco de tia sistemo estas limigitaj.

La pozitiva pritakso de Esperanto, kiun Banov donas, estas des pli valora, ĉar ĝi estas farita de homo, kiu studis Esperanton speciale por la celoj de siaj teoriaj esploroj en la fako de la stenografio kaj de la skribo.

Dimităr HAGIEV

IN MEMORIAM

Forpasis ege rimarkinda esperantisto

La tutmonda esperantistaro funebras: la 15.12.1987 forpasis IVO LAPENNA. Lia nomo jam sufiĉas por rememorigi al ĉiu, kia granda individueco forlasis niajn vivojn.

IVO LAPENNA estis la plej populara figuro en la Esperanto-movado eĉ kiam li ne plu estis prezidanto de UEA. Ĉar ne la posteno, ne la titolo difinis lian signifon por la evoluigo de la moderna pozicio de nia lingvo kaj movado, sed liaj personaj kvalitoj de organizanto, oratoro, inda reprezentanto de la esperantistaro antaŭ plej altaj neesperantistaj instancoj kaj institutoj. Li argumentite kaj elokvente defendis la poziciojn de la Internacia Lingvo principe kaj tiujn de Esperanto-konkrete. Multfoje sur tiu kampo li rikoltis gravajn sukcesojn, kiujn la Internacia Esperanto-movado ĝuas aktuale. Ni rememoru nur la unuan favoran al Esperanto rezolucion de UNESKO (Montevideo, 1954) kaj la plej freŝan internacian konferencon en Aŭstrio lige kun la Centjarigo de nia lingvo.



Prof. Ivo Lapenna — tiama prezidanto de UEA, parolas dum la Eŭropa esperantista konferenco okazinta en Vieno la 11-an de julio 1965.

Al li ĉefe apartenas la sendube pozitiva paŝo pri kunfluiĝo de la du rivalaj mondaj organizaĵoj Universala E-Asocio kaj la Internacia E-Ligo sub la populara kaj konata firmao de UEA. Tiu internacia organiza unueco estis absolute ne-

cesa por nia Movado, kiu jam povis inde reprezentiĝi antaŭ la ekstera neesperantista publiko kaj por plua sukcesa evoluo de la landaj kaj fakaj Esperanto-organizaĵoj tra la mondo.

Multon oni povus diri same pri liaj personaj kvalitoj en evoluigo de Esperanto en la sfero de oratora arto. Li sciopovis regi la publikon, kiu atentoplene aŭskultis lin, observante samtempe lian esprimriĉan artistecan fizionomion.

Kompreneble, ankaŭ li ne estis senerara en sia vivo kaj agado. Sed pri tio ni multfoje kaj aferece diskutis en forumoj de UEA. Nun la funebra etoso postulas de ni ĉiuj sekvi la saĝan antikvan proverbon: „Pri la forpasintoj — aŭ bonon, aŭ nenion!“

La nomo de tiu granda personeco de la Esperanto-movado restos por ĉiam en la jam unujarcenta historio de Esperanto!

Sofio, en decembro 1987

Nikola ALEKSIEV,
honora membro de UEA



KORTUSA HUMANECA LIBRO

Kun intereso kaj plezuro mi tralegis la originale verkitan en Esperanto libron de Nevena Nedelceva „Dum nokta deĵoro“ (eldono de HEA, Budapeŝto, 1987).

La bone broŝurita volumeto (87 paĝoj) kun originala kovrilpaĝo konsistas el 12 noveloj kaj du teatraĵetoj. Plejparto el la noveloj estas pli aŭ malpli senpere ligitaj kun Esperanto, la senpretendaj teatraĵetoj („En kunveno“ kaj „Jubileo“) estas pure pri-

esperantaj, precipe interesaj kaj kompreneblaj por veraj entuziasmaj samideanoj.

Kortuŝaj estas la tri unuaj noveloj. Du el ili — „La blankaj floroj“ kaj „La blanka ŝtono“ — trape-netras profunde humana kontraŭmilita etoso, delikate esprimita patrino malbeno al la sangaj militoj, kiuj senkompatate forportas, ekstermas milojn da junaj homaj vivoj. En la tria novelo — „Heroaĵo estas vivi“ — rolas (kvankam ne ĉefan, sed periferian rolon, se oni povas tiel diri) la bone konata por ĉiu bulgario, kaj ne nur por bulgarioj, Trifon Hristovski, kiu per la ekzemplo de sia heroa-tragika sorto donas al la juna ĉefa heroino Svetlozara neforgeseblan lecionon, fakte savas ŝin, jam pretan mortigi sin pro perfido de la amato, de plena senespero, revenigas ŝin al la vivo...

La novelo „Malfacila problemoj“, kiu prezentas paĝetojn el la taglibro de juna 16-jara knabino en la t. n. „transira aĝo“, atestas pri certagrade scipovo de la aŭtorino penetri en la psikologion de juna homo. (Tamen mi atentigu en krampoj, ke de stilistika vidpunkto ĉi novelo ne tute kontentigos la postuleman leganton kun bona literatura gusto, kaj la mano de la sperta redaktoro ne estus tie ĉi superflua).

Kiel bona propagandilo por Esperanto povus servi la delikate bonhumora, senpretende-kortuŝa, 4-paĝa rakonteto „Patrina koro“. Ĝi sonas kiel paĝeto el la aŭtobiografio de la aŭtorino. La samon oni povas diri

sub hispana ĉielo

(daŭrigo de n-ro 1/1988)

ĜOM PRI HISPANA E-MOVADO

— Bonvolu nomi min Lupe — milde ekridetis ŝi. — Ja ni estas jam amikoj, des pli esperantistoj!

— Konsentite, Lupe! — mi diris. — Kaj nun bonvolu rakonti al mi koncize pri la hispana Esperanto-movado kaj pri via linceo. Tio estos tre interesa por la bulgariaj esperantistoj.

— Ho, tio ne estas facila afero, sed tamen mi provos — diris Lupe.

— Esperanto penetras en Hispanon pere de francaj libroj kaj revuoj kaj dank' al perleteraj rilatoj de d-ro Zamenhof kun iuj hispanaj intelektuloj. La unua madridano, kiu okupiĝas pri Esperanto, estas Joaquín de Arce y Bodega, bibliotekisto de la Senato: en 1889 li akiris tri ekzemplerojn de la Unua Lernolibro de d-ro Zamenhof, eldonita en 1887. En 1899 la Madrida Ateneo organizas la unuan kurson de Esperanto, kiun gvidas Ramón Andrén. Li publikigas resumon de la Esperanta gramatiko en „Revista de estenografía y fonética“ kaj poste aperigas Hispanan Esperantan vortaron. En 1903 Andrén kaj Arcé y Bodega aliĝas al „Internacia Esperanto-Movado“, al kiu apartenas 13 madridaj esperantistoj. La sekvan jaron Andrés Bravo del Barrio fondas la Madridan Esperantistan Sekcion ĉe la

kultura societo „Fomento de las Artes“. Ekde tiu ĉi momento en Hispanio pli rapide fondiĝas esperantistaj grupoj kaj societoj, inter ili ankaŭ „Madrida Esperanta Grupo“ (1907), kies unua prezidanto estas kapitano José Perogordo. La unua hispana E-revuo aperas en 1908 sub titolo „Hispana Revuo“ kun redaktoro José Menéndez. Komence de 1909 Luisa Ayza fondas en Madrido la unuan kaj tiutempe unikan specife virinan asocion „Virina Esperanto-Grupo“. La „Gaceta de Madrid“ publikigas la 15-an de aŭgusto 1911 Ministerian Ordonon, kiu permesas la instruadon de Esperanto en publikaj lernejoj kaj universitatoj en tuta Hispanio. En 1931 fondiĝas Hispana Esperanto-Asocio, kies sidejo troviĝas en Madrido. En ĝi membras ankaŭ pluraj parlamentanoj (F. Azorin, N. de Pablo, R. Almada, C. Redondo, k. a.). Sub la aŭspicio de HEA ekfunkcias E-kurso en Radio España — dufoje semajne. Nur en 1951, post 14-jara interrompo, rekomenciĝas Esperanto-kursoj en Madrido, kio signifas revivigon de la movado post la civilita milito.

Mi prezidas la Madridan Esperanto-Liceon ekde 1984. Ĝi inkluzivas ankaŭ la fonditan en 1979 Hispanan Esperantan Junularan Societon (HEJS). La Madrida Esperanto-Liceo efektivas interesan pedagogian agadon: en 1980 pli ol 800 lernantoj vizitadis ĝiajn kursojn! Ĝi organizas ankaŭ traduk-kursojn,

kiuj trovas vastan kaj favoran eĉon eksterlande. La biblioteko de MEL posedas pli ol 700 titolojn, inter kiuj ankaŭ multaj bulgariaj E-eldonoj, kaj ĝi daŭre kreskas. Plimultigas ankaŭ la literaturaj kaj turismaj verkoj, iniciatitaj de MEL: „Parolu Esperanton“, „Madridoj kaj ĉirkaŭaĵoj“, luksa ilustrita broŝuro „Hispanio“, „Sintempa simfonio“, „Sanga nupto“, „La domo de Bernarda Alba“, k. a. La informada laboro por la disvastigo de Esperanto efektiviĝas per partopreno de plej aktivaj liceanoj en radio kaj televid-programoj kaj per ilia kontribuo al diversaj gazetoj. MEL eldonas monatan bultenon „Nia Voĉo“, en kiu aperas informoj pri ĉiuj sociaj, kulturaj kaj propagandaj aktivecoj de la liceo. Ĝin redaktas Giancarlo Fighiera. Lia kaj tiu de Ada Sikorska aliĝo al MEL kontribuas al altigo de la lingva nivelo de la liceanoj. Ni kolektiĝas ĉiun lundon — laŭ anticipe aprobata programo: prelegoj je diversaj temoj, konversacia rondo, propaganda aktivado (gluado de afiŝoj surstrate, k. a.). Trigradaj kursoj estas regule gvidataj far spertaj instruantoj. Nia liceo estas ofte vizitata de gravaj eksterlandaj movadaj eminentuloj kaj la renkontiĝoj kun ili ĉiam riĉigas nian programon. Tiel estas ankaŭ nun, kiam vi gastas al ni. Fakte ni jam havas riĉajn informojn pri Bulgario kaj pri via multjara kaj vigla Esperanto-movado — unu el la plej fortaj mondskeletoj. Tion ni ŝuldas ankaŭ al viaj prelegoj, — konklude diris Lupe. — Kaj nun mi havas specialan inviton por vi, — ekridetis ŝi, — Post du tagoj en

ankaŭ pri la novelo „Nokta deforo“, kiu donis la titolon al la libro, aŭ pri „Floroj de l'Amikeco“ — sincera animo — rakonto pri la hazarda renkontigo de grupo da turistoj kun maljuna instruisto, arda ŝatanto de floroj kaj beleco, kiu amikiĝis, ne lasante sian vilaĝeton en Rodopi-montaro, kun multaj korproksimaj al li homoj tra la tuta terglobo nur dank' al la unikaj eblecoj de la Lingvo Internacia, kreita antaŭ 100 jaroj de la juna puranima humanisto-revulo „Doktoro Esperanto“...

Finante ĉi mallongajn notojn pri la antaŭnelonge aperinta novelaro de Nevena Nedelčeva, mi emas emfazi, ke en ĉiu rakonto de „Nokta deforo“ oni sentas la tre bonan, sinceran koron de la aŭtorino. Do mi ne dubas, ke ĉiu — juna aŭ matura — esperantisto, kies manojn trafos tiu ĉi kortuŝa humaneca libro, ne restos indiferenta kaj eksentos fieron, ke li ankaŭ apartenas al la multmila tutmonda anaro de la verdstelaj samideanoj, la fervoraj adeptoj de la Lingvo de Paco kaj Amikeco, kiu kunligas la bonvolemajn reprezentantojn de la progresema homaro en ĉiuj kontinentoj de la Tero.

Nadija ANDRIANOVA,
Kievo, USSR

VERA SALUTO

„Saluto“ — poemaro de Antonina Apollo.
Edlono de Kardo, Coatbridge, Skotlando,
1986, Paĝoj: 36.

urbo El Casar de Talamanka okazos taŭroludoj. Se vi ne kontraŭstaras, ni vin kondukos tien. Estas ege interese ĉeesti tian hispanan spektaklon! Ĝis tiam vi vagadu tra Madrido.

...La ĉielo super ni estis rozkolora. Jam vesperiĝis, sed la aero estis ankoraŭ sufiĉe varma. La bulvaroj brilantaj per miloj da lampoj estis plenplenaj de homoj gaje promenantaj. El la multnombraj kafejoj, trinkejoj kaj restorcioj aŭdiĝis muziko kaj ridoj. ... Madridanoj ŝatas amuziĝi ekster siaj domoj ĝis malfrua nokto.

— Ĝis baldaŭ — mansasvingis Lupe el sia aŭtomobilo kaj enmiksĝis en la trafikan torenton de la urbego.

Ci-vespere, post vespermango el tipaj hispanaj manĝaĵoj, nia gastiganto José projekciis al ni kelkajn el siaj filmoj el la serio „Esperanto vojaĝas“. Tiuj mallongdaŭraj bone filmitaj kaj sonorigitaj per muziko kaj komentarioj filmetoj malkovris antaŭ ni tute alian Hispanion: la mistere ĉarman mondon de la rezervejo Kuenka, arbarkovritajn montojn kun gaje susurantaj torentoj, purakvajn lagojn ĉirkaŭitajn de freŝverdaj herbejoj, la nordan marbordon de la lando kun pitoreskaj, tipe hispanstilaj urbejoj kaj vilaĝoj. ... Pere de tiuj filmoj ni kvazaŭ estis ankaŭ en foraj Japanio, Hindio, Indonezio, Kanariaj Insuloj. ... kaj eĉ en Bulgario, kie José multon filmis. Poste ni longe diskutis pri la montritaj filmoj, pri nia Internacia Ligo de Esperantistoj-Kinoamatoroj, kies estrarano estas ankaŭ José; pri la organizado de la Dua Internacia Kino-Festivalo, kiu okazos en ok-

tobro ĉi-jare en Vraca (Bulgario). Laŭ amika peto de José mi redaktas lian Esperantan tradukon de la romano „Nebulo“ de la hispana verkisto-klasikulo Miguel de Unamuno. Nia komuna laboro sur la manuskripto (kelkiam ĝis malfrua nokto) ofte provokis noblajn kunpuŝigojn kaj diskutojn pri tradukarto, pri fideleco al la originala teksto. ...

BELECO, ARTO KAJ KONTRASTOJ

Sur du el la ĉefaj trafikarterioj — Gran Via kaj Calle de Alcalá, — oni renkontiĝas kun preskaŭ ĉiuj arkitekturaj stiloj de Madrido: malnovromana kaj baroka, malnovgotika, neoklasika. malnova stilo kaj nuntempa, moderna arkitekturo. ... Altaj, imponaj, belaj konstruaĵoj, kies fasadoj aspektas tute novaj. Kaj neniu el il similas al la ceteraj! Tio faras Madridon neripetebla bela kaj unika hispana urbego, kies ĉarmo ravas vin por ĉiam! ... Laŭ tiuj grandaj magistraloj la ĉefverkoj de la famaj arkitektoj Sabatini, Villanueva kaj Ventura Rondóñez (de la epoko de reĝo Karlo III) viciĝas apud la belegaj preĝejoj Calatravas, Jerónimos Reales. Ĉiupaŝe — sur la fasadoj kaj la tegmentoj de imponaj konstruaĵoj — vidiĝas surskriboj: Banko Bilbao, Banko Central, Banko España. ... Ja tio estas ankaŭ la centro de la hispana kapitalo! En preskaŭ ĉiu kafejo, restorcio kaj en la centraj haltejoj de la metroo vi povas vidi homojn, kiuj obstine enigis monerojn en aŭtomatajn monkestojn, impete tirante la tenilon, kun streĉo atendante sian bonŝancon. ...

Finleginte la poemaron „Saluto“, vi vere sentas vin varme kaj sincere salutita de Antonina Apollo. La ĉefurbo de Estonio — Tallinn, ĝuas ŝiajn oleajn bildojn, aŭskultas ŝin ludi pianon; multaj eksterlandaj geamikoj legas ŝiajn poemojn, ĉar. ... Antonina Apollo regas kelkajn artojn — fakto kontribuanta por la bona kvalito de ŝia poezio.

La poemaro „Saluto“ enhavas poemojn, aperintaj en la revuo „Esperanto en Skotlando“ kaj ricevita de geamikoj en multaj landoj. Inter la lastaj oni povas legi: „Bildkarto pri la maro — al W. U.“, „Respondo al letero“, „Al fora amiko“, „Letero al Koljo Markov“, „Al Stefan Apostolov“ k. a.

El ĉiuj poemoj blavas senpera sincereco. La versaĵoj „Saluto“, „Feliĉa tago“, „Kolektanto“ montras la grandan signifon de Esperanto-korespondado por la aŭtorino. „Sofio“, „En malhele“, „Promenado“, „Pluvo“, „Vespero“, „Nokte“ malkovras ĉarme animajn emociojn, respegulas profundajn travivaĵojn.

La pentristino Apollo kreas ankaŭ per vortoj belegan pejzaĝan lirikon en „Aŭtuna preludo“, „Aprilo“, „Unua neĝo“, „Maro“. Ĉiu bildo provokas diversajn sentojn kaj pensojn, kuĵn ŝi trafe elverŝas en versojn.

Venkinte la solecon kaj malĝojojn, Apollo pravas siajn esperon kaj viglan spiriton en „Silento“, „Novjara meditado“ k. a.

Kiel kovrilbildon la redaktoro Albert Goodheir elektis la ilustraĵon al la poemo „Lapo“, farita de Apollo mem.

Marija P. ANGELOVA

Por preni sandviĉon kun taso da kafejo ni eniras originalan kaj eble unikajn en la mondo Muzeon de Kolbasoj! Ĉi tie oni povas trovi preskaŭ ĉiujn specojn de la monda kolbasindustrio. Por ĉiu ŝatanto de viandaĵoj, por ĉiu, eĉ plej pretendema gusto! Tamen estas malfacile fari elekton. Ankaŭ ĉi tie ne mankas monaŭtomatoj-ludiloj, ĉe kiuj staras viroj kaj virinoj. Ankaŭ tie ĉi, kiel en ĉiu trinkejo, oni ĵetas surteren la mango-restaĵojn, paperaĵojn, cigaredstumpojn. ...

Ni atingas bulvardon Paseo del Prado kun la fontano de Neptuno. Nur kelkdekojn da metroj dekstre — kaj ni jam estas antaŭ la belesta, impona konstruaĵo de la mondfama Muzeo del Prado — la trezorejo de la hispana pentroarto. Antaŭ la fronta fasado nin renkontas la statuo de Velasquez, ĉefverko de la skulptisto Marinas.

Starante en la longa vico de vizitantoj, mi hazarde aŭdis polan parolon. Ĉu poloj en Madrido? Jes! Kune kun la pola grupo ni eniris la muzeon kaj preskaŭ tutan tagon ni restis tie. Dank' al ilia simpatia juna ĉiĉerono ni ĝuis la genian majstrecon de originalaj verkoj de mondfamaj pentristoj kaj skulptistoj: Goya, Velasquez, El Greco, Rembrandt, El Bosco, Rubens, Rafaelo. ... La klarigoj de la ĉiĉerono venigis nin en la mondon de la granda arto, konatigis nin kun la karakterizaĵoj de ĉiu el la prezentitaj majstroj kaj iliaj verkoj. ...

Post tiom da impresoj kaj estetikaj emocioj la grandega bele aranĝita „verda koro“ de Madrido — parko Retiro — gastame ĉir-

ESPERANTO-TREZOREJO EN VIENO

Antaŭ nelonge mag. Herbert Mayer estigis direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo — Vieno. Li estis afabla respondi al demandoj de reprezentanto de la Redakcio de „Bulgara Esperantisto“.

— Mag. Mayer, bonvolu prezenti vin!

— Mia nomo estas Herbert Mayer. Mi naskiĝis en 1953, en Vuzmarkt, Stirio (Aŭstrio). Ekde mia 15-jara aĝo mi okupiĝas pri Esperanto — mi komencis aŭtodidakte lerni la Internacian Lingvon. Mi studis germanan, francan kaj hispanan lingvojn en la Universitato de Graz. Poste mi instruis en la Komerca Akademio de Indenburg kaj en la Universitato de Graz — unue kiel asistanto kaj poste ĉefe kiel instruanto de lingvistiko ĉe la germanlingva fakoj. En Indenburg mi ankaŭ gvidis E-kursojn. Ekde la jaro 1984 mi laboras profesie por Esperanto — unue en Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds (Svislando), kiu invitis min verki perkorespondan ger-

manlingvan kurson de Esperanto. Tiu jaro estis tre grava por mi — la Internacia Lingvo estis mia ĉiutaga lingvo kaj krome mi povis enprofundiĝi en la problemaron de Esperanto. Jam tri jarojn mi laboras en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno — unue kiel kunlaboranto, kaj ekde la aŭtuno de 1987 — kiel direktoro de la Muzeo. En la libera tempo s-ro Walter Klag kaj mi prizorgas senpagan perkorespondan kurson de Esperanto por komencantoj (surbaze de la kompilita fare de mi germanlingva kurso en Chaux-de-Fonds). Krome mi komencis verki perkorespondan kurson pri originala Esperanto-literaturo, kiun mi intencas fini ĉi-jare.

— Vere, interesa ideo. Kion enhavas tiu kurso pri originala E-literaturo?

— Gis nun mi sukcesis pretigi ses lecionojn, kiuj jam estas haveblaj. El kiom da lecionoj ĝi konsistas mi ankoraŭ ne scias, ĉar ĝi ankoraŭ ne estas finverkitaj. La kurso estos malfermita, al ĝi mi ĉiam estonte povus

kaŭsi nin per la freŝeco de siaj subtropikaj arboj kaj verdaj herbejoj. Sur ili kuris kaj ludis multaj infanoj. En la pura akvo ĉe lago, ĉe kies bordoj staras la fama Vitra Palaco, boatpromenis gajaj paroj. . .

RENKONTIGO EN LA REDAKCIO DE „HEROLDO“

Je vesperiĝo, kune kun niaj simpatiaj dommastroj Ada kaj Gian-Carlo Fighiera ni sidis apud granda fenestro, kiu rigardas al teraso kun ĝardeneto. Ĉe tablo, kovrita per tipaj hispanaj kaj polaj gastronomiaj specialaĵoj kaj frandaĵoj, ni jam pli ol du horojn amike babilis. La bele arangita loĝejo de miaj malnovaj amikoj estas samtempe redakcio de gazeto „Heroldo de Esperanto“, kies ĉefredaktoro estas s-ino Ada Sikorska-Fighiera. Kun granda intereso ni trarigardis la zorgeme kaj praktike aranĝitajn ejojn kaj ŝrankojn, la riĉegan bibliotekon kun esperantaĵoj el la tuta mondo, la laborĉambron de Ada. Sperta ĵurnalistino-esperantistino, ŝi sola (helpe de nesalajritaj kunlaborantoj) kolektas, planas, redaktas kaj enpaĝigas la materialojn por ĉiu nova numero de „Heroldo“, sendas ilin por presado en Italio! . . . Ŝi estas kvazaŭ „homo-orkestro“, kiu samtempe ludas buŝharmonikon, gitaron kaj tamburas perpede. . . Ĉar ŝi mem ordigas ankaŭ la financojn, la abonojn de la gazeto, skribas kaj respondas al centoj da leteroj, ktp, ktp! Pro sia laboremo, sindonemo kaj obstino ŝi vere meritas profundan estimon, kiun ni ne ŝparis! Estis agrable por ni vidi ĵus alvenintan novaperintan kajejon de „Bulgara Esperantisto“, kuŝantan sur ŝia skribtablo, kaj aŭskulti laŭdajn vortojn laŭ nia ad-

reso. . . Nia amika kaj kolegeca konversacio dum la vespermango tuŝis multajn problemojn pri profesia kunlaborado inter ambaŭ eldonoj, pri la aktuala stato de la Esperanto-movado kaj ĝia estonto, pri la taskoj de la ĵurnalistoj-esperantistoj por plej rezultodona popularigo de la Internacia Lingvo, pri la nobla kaj grava rolo de la Esperanta gazetaro. . . Vere agrabla kaj utila renkontiĝo, kiun ni rememoras kun ĝojo kaj danko! . .

LA CORRIDA — TRADICIO, VI-RECO, ARTO. . .

Dum ĉiuj jarsezonoj, en diversaj lokoj en Hispanio okazas popolfestoj kaj foiroj, kiuj jam havas mondan renomon. La plej famaj el ili — tiuj en Barcelono, Valencio, Pamplona kaj Sevilla — estas amase vizitataj de multaj landaj kaj eksterlandaj gastoj, kiuj ĝuas verajn spektaklojn, neforgeseblajn pro ilia varieco, bonhumoro, brile belaj artfajraĵoj kaj emociaj „corrida“ (taŭroludoj).

La „corrida“ estas ne nur emocia, vere forta, neforgesebla travivaĵo! Ĝi estas kruela spektaklo! Tiu antikva kutimo, devenanta el insulo Kreto, jam de jarcentoj estas nedisigbla parto de la popolfestoj en Hispanio kaj la plej specifa distraĵo, kiun hodiaŭ oni povas vidi nur en tiu lando.

En Madrido, Valencio kaj Barcelono ni vizitis ankaŭ taŭrocirkojn, sed por unua fojo ni ĉeestis kaj spektis taŭroludojn en la malgranda urbo El Casar de Talamanka, situanta 60 kilometrojn norde de Madrido. Laŭ invito de niaj novaj amikoj el la Madrida Esperanto-Liceo, en malfrua posttagmezo, kiam la suno jam subiras okcidenten, malantaŭ la akraj montopintoj, nia aŭtomobila karavano eniris la

stratetojn de El Casar de Talamanka, ornamitajn per pendantaj transparentoj kaj girlandoj el diverskoloraj lampoj. Tie kaj tie aŭdiĝis sporadaj eksplodoj de luminkraketoj, ludis muziko. . . Tiu malgranda urbo plenforte festis la finigon de fruktodona rikoltado — post longaj monatoj de laciga laboro sur grenkampoj kaj en vinberujoj. . .

La taŭrocirko estis ĉirkaŭita de turnigantaj karuseloj, de standoj supersutitaj per diversaj varoj, tipaj hispanaj frandaĵoj, fruktoj. . . La krakado de la karuseloj, la muziko kaj la bruado de la homamasoj miksiĝis kun la invitkrioj de la vendistoj kaj la eksplodoj de la luminkraketoj. . . La festo estis en sia plena apogeo! . .

La amfiteatro de la taŭrocirko estis plenplena de ekscititaj homoj — ridantaj, krientaj, vigle kaj laŭtvoĉe interparolantaj. . . Oni proponis al ni — gastoj el fora Bulgario — okupi sidlokojn sur la honora tribunuo apud la urbaj eminentuloj. Ekster la muroj de la taŭrocirko bruegis homoj sur kamionplatformoj, sur ĉaroj, porteblaj ŝtuparoj. Ankaŭ ili volis ĉeesti la longe atendatan spektaklon! . .

En la vesperiĝo eksplodis muziko — la muzikistoj de la urba blovorkestro, vestitaj en specialaj ĉemizoj, ekludis salut-marŝon. La arenon eniris longa vico da toreadoroj, matadoroj kaj rajdantaj pikadoroj kune kun iliaj helpantoj, sekvataj de veturiloj, kiuj trenas la taŭrojn post ilia mortigo. Ĉiuj estis vestitaj en specialaj kostumoj. Sub la frenezaj salutkrioj de la ĉeestantoj ili rondmarŝadis dum la blovorkestro ludis toreadoran muzikaĵon. Por la okulo de estetikulo ĉi tiu defilado de toreadoroj kaj

aldoni novajn ĉapitrojn pri diversaj aŭtoroj. La unuaj ses lecionoj pritraktas la bazajn literaturajn ĝenrojn pere de ekzemploj el la originala E-literaturo kaj el la monda ne-Esperanta literaturo en E-traduko. Ili liveras bazajn sciojn pri la literaturo ĝenerale kaj helpas kompreni la originalan E-literaturon.

— Kiel oni povas el eksterlando mendi librojn aŭ aliajn esperantaĵojn ĉe IEMV pere de la internacia pruntedona reto?

— Se oni loĝas en eksterlando, sufiĉas iri al la nacia, universitata aŭ alia granda biblioteko. Pere de ĝi oni povas pruntepreni libron aŭ materialon ĉe IEMV. Tiucele oni devas plenigi formularon, kiu disponas ĉiu granda biblioteko. Se ĉio iras glate, oni ricevas la E-libron post tri semajnoj, se estas malhelpaĵoj en la transportado — tio povas daŭri eĉ du monatojn. Estas certaj personoj, kiuj studas Esperanton kaj planlingvan historion per regula pruntepreno de libroj ĉe nia Muzeo. Ĉiunonate la nombro de la pruntedonataj libroj kaj materialoj de IEMV varias inter 10 kaj 30, kaj jare pli ol 100.

— Kiel vi vidas la estontan funkciadon de IEMV?


— La funkciado de la Muzeo estas direktata, kiel ĝis nun, unue al neesperantistoj, kiuj venas ĉi tien

por informiĝi. Ili venas el multaj landoj, volas ricevi bazajn informojn pri Esperanto. Ankaŭ la nombro de la esperantistoj, vizitantaj IEMV estas granda. Kaj en tiu senco la Muzeo estas verŝajne la plej bona kaj daŭre funkcia informo servo en la mondo, kiu estas trifoje semajne vizitebla — lundon, merkredon kaj vendredon inter la 9-a kaj 15-a horo. La vizitantoj de la Muzeo estas ne nur eŭropanoj, sed homoj ankaŭ el aliaj kontinentoj — el Usono, Brazilo, Japanio k. a. landoj. Tage venas meze ĉirkaŭ 20 personoj, precipe ne-esperantistoj. Multaj personoj venas por studi surloke diversajn E-librojn kaj -materialojn — tiel ili uzas la servon de IEMV.

— Kaj fine, kion Vi ŝatus diri al la legantoj de „BE“?

— Nia laboro dependas de la helpemo kaj donacoj de la esperantistoj el la tuta mondo. Tial mi turnas min al la legantoj de „BE“ kun peto sendi al Internacia E-Muzeo (Hofburg, A-1010 Vieno, Aŭstrio) ĉion, kio rilatas Esperanton — raportoj pri E-klubo kaj -societoj, pri klubvesperoj, kunsidoj, libroj, gazetoj, fotoj, dokumentoj, ankaŭ eltranĉitaj bulgaringvaj aŭ alilingvaj gazetartikoloj pri Esperanto. La donacintoj klare menciui sian nomon kaj adreson. Antaŭdankon!

Intervjuis: Evgeni GEORGIEV



Emocia momento dum la taŭroludoj en El Casar de Talamanka
Foto: la aŭtoro

helpantaro estas la plej bela parto de la festo kaj de la taŭroludoj ĝenerale pro ĝia majesteco kaj kolorriĉeco.

La vera emocio komenciĝis post la klaronsignalo, kiu anoncis la eliron de la unua taŭro el la apud-areno bovejo. Sur la areno restis nur la toreadoro kaj la granda nigra taŭro, kiu kolere batis la grundon per siaj fortaj hufoj... Komenciĝis io nevidita de ni ĝis nun en la reala vivo: la taŭrobatalo. La toreadoro majstre, arte kaj kuraĝe strebis furiozigi la taŭron, ŝvingante antaŭ ĝiaj okuloj „muleta“—ruĝan tukon, gracie evitante la atakojn de la besto. Li sukcesis proksimiĝi al la viva nigra rokego kaj piki ĝian dorson per multkoloraj pikstanĝetoj — „banderillas“, kiuj vere furiozigras la taŭron, sin ŝetant al sia kontraŭbatalanto. Konantoj de la taŭroludo klarigis al ni, ke estas tri ĉefaj momentoj en ĝi: „varas“ (prologo), „ban-

derillas“ (Pikstanĝetoj) kaj tiu, kiun ili konsideras plej grava — la finfaro, t. e. la taŭromortigo. Ĉi-momente la arenon eniris du pikrajdantoj, kiuj per ĝentilaj ceremonigestoj salutis la eminentulojn kaj la publikon. Ili ankaŭ aligis al la taŭroludo, strebante altiri al si la atenton je la besto. El la dorso de la taŭro jam fluetis sangaj strioj... Mi streĉe fotadis la kruelan batalon. Venis la decida momento: sub la kuraĝigaj krioj de la spektantaro la toreadoro ekstaris momente kvaŝaŭ konsternita antaŭ la malleviginta kapo de la taŭro kaj per fulmrapida movo enpikis sian glavon en la taŭrokolon... Sub la frenezaj salutkrioj de la stariginta homamaso en la amfiteatro la taŭro falis teren kaj plu ne ekmoviĝis. Ĝi estis morta!... Tuj la arenon eniris helpantoj, kiuj per kelkaj lertaj movoj de siaj akraj tranĉilegoj tranĉis la orelojn kaj la voston

de la mortigita taŭro kaj per riverenco enmanigis ilin al la toreadoro-venkinto. La blovorkestro ludis salutmuzikojn. La publiko emocie aplaudis la toreadoron, kiu, akompanate de siaj helpantoj, ĉirkaŭiris la arenon (kun ĉapelo kaj taŭrovosto enmane) kaj fiere akceptis la frenezajn aplaŭdojn... Li haltis kaj ekstaris antaŭ la honora tribunulo, ĝentile riverencis kaj kun digno akceptis el la manoj de la urbestro specialan distingon kaj donacon — metalan statueton de furioziginta taŭro. Aldone estis donacita al li ankaŭ viva blanka kokino kaj ne malgranda monsumo. Bone rekompencita majstro kaj vireco de sperta toreadoro!... Intertempe venis levmaŝino, kiu forprenis de la areno la mortigitan taŭron...

Nun oni jam povis spiri libere, iom trankviliĝi, komenti la ĵus finigintan unuan parton de la taŭroludoj, eltrinki glaseton da refreŝiga malvarma teo aŭ citronado...

Ĝis la krepuskiĝo la publiko devis spekti ankoraŭ du taŭrobatalojn — ĉi-foje de pikadaroj, kaj poste — la plej kuraĝaj havas eblecon mem taŭroludi sur la areno — sen pikstanĝoj kaj glavoj!... Nature, se estas dezirantoj.

En la jam malheliginta ĉielo super la tegmentoj de la blankaj domoj de El Casar de Talamanka eksplodadis la „floroj“ de iluminraketoj, de ĉiuj flankoj sonis muziko, krakadis karuseloj... Ie oni gaje kantis, akompanate de gitaro, pasie dancis „flamenko“...

La taŭroludoj finiĝis.

La nova vino ŝaŭmis en lignaj kaj ceramikaj siteloj kaj la popolfesto vigligis pli kaj pli, eble daŭris ĝis la mateniĝo...

Donĉo RITROV
(Daŭrigota)

Korrespondo

Georgi MIHALKOV

La rakonto „Korrespondo“ estas verkita laŭ vera okazintaĵo, rakontita al la aŭtoro de unu el la multnombraj kaj sindonaj delegitoj de UEA. Tial la aŭtoro dediĉas la rakonton al ĉiuj delegitoj de UEA — la helpemaj ambasadoroj de la internacia Esperanto-movado.

La jaroj pasis, sed la doloro en Lina igit ĉiam pli akra kaj pli akra. Ofte nokte ŝi vekigis kaj longe senmova kuŝis en la lito. Ekstere la vento susuris, la folioj de la tilioj mallaŭte flustris kaj ŝi ne povis fermi okulojn por ekdormi. Ŝajnis al ŝi, ke en tia silenta luna nokto, li atente malfermos la pordon, molpaŝe eniros la ĉambron, klinos sin super ŝin kaj apenaŭ kisos ŝin tiel, kiel iam, ege ege delonge, kiam ŝi estis nur seĝara. Tiel delonge estis, ke Lina preskaŭ ne memoris lin. Nun ŝajnis al ŝi, ke li estis alta, brunhara, liphara. Ŝi ne povis diri ĉu tiam, en ŝiaj infanaj okuloj, li aspektis bela, sed kiam ŝi rigardis liajn fotojn, ŝi vidis, ke li estis bela. Liaj tatarformaj okuloj brilis kiel du karbetoj, la nazo iom platis, la vizaĝo estis osteca, tamen el lia tuta mieno radiis varma kareco. Antaŭ la fotoaparato li certe deziris aspekti serioza, sed la ride-to sub liaj densaj lipharoj ne povis kaŝiĝi kaj restis por memoriĝi, ke li ofte ridis.

Rigardante la fotojn, Lina tute ne komprenis kiel okazas tiel, ke homo naskiĝas, vivas kaj subite malaperas, kvazaŭ li neniam estus ĉi tie, kaj se ne restus tiuj kelkaj flavaj fotoj, ŝi ne kredus, ke li vivis kaj li estis ŝia patro. Tiel stranga kaj nekomprenebla ŝajnis ĉio. Ĉu en si mem ŝi portas ion el lia voĉo, el lia rido, el lia spiro? Ĉu iu ŝia gesto aŭ rigardo rememorigis iun pri li? Ĉu, antaŭ ol ekiri la senfinan vojon, ion tamen li lasis al ŝi?

Kiam Lina estis infano, ŝi preskaŭ neniam pensis pri li. Tiam ĉio aspektis tiel normala. En la domo kaj sur la stratoj ĉiuj ripetis iun strangan vorton milito. Li ekveturis kaj antaŭ la ekveturo ŝi ne memoris ĉu ŝi kisis lin aŭ ne. Pli gravis, ke li ne revenis kaj neniu povis diri al ŝia patrino kiam kaj kie ĝuste li pereis. Neniu el liaj amikoj vidis lin en la lasta minuto de lia vivo. Iu diris, ke iun nokton li ekiris kun eta patrolgrupo kaj la tuta grupo ne revenis, alia rememoris, ke bombo diskarnigis lin, tria lastfoje vidis lin en lia lazareto... Kaj jam tute egalas kion rakontis la kvara, la kvina liaj amikoj kaj kunbatalantoj. Finfine ĉiuj rakontoj laŭ iu stranga logiko fandigis, interplektigis kaj el ili igit tute nova rakonto kun klara komenco, longa historio kaj same klara fino: li malaperis sen spuro, sen signo kaj de li restis nek letero, nek vesto, nek tombo en malproksima, nekonata lando.

Eble iom da tempo la patrino kredis, ke li vivas, sed post kelkaj jaroj ŝi denove edziniĝis. Dum estis infano, Lina same kredis, ke li vivas, tamen iom post iom ŝi ko-

mencis kompreni, ke tiam en la pluva septembra mateno, li ekiris la vojon, kiu preskaŭ ĉiam restas senfina. Jes, tiam ĉio ŝajnis normala kaj klara. Lina devis esti unu el tiuj infanoj, kiuj plej bone komprenis la strangan vorton milito.

Tutan vivon ŝia patrino penis ekscii kie ĝuste pereis la patro, sed vane... Tio turmentis ŝin kaj antaŭ la morto la lastaj vortoj de la patrino estis:

„Serĉu kaj trovu la tombon de via patro!“

Eble tiam, en la lasta minuto, antaŭ la eterneco, la patrino konsciis, ke dum sia tuta vivo ne sufiĉe ŝi persistis por trovi la tombon de tiu, kiun ŝi amis kaj kun kiu ŝi vivis. Tion ŝi testamentis al la filino.

Tiam Lina ne pensis, ke tio igos tiel grava en ŝia vivo, sed nun, kiam pli ofte ŝi meditis pri tiu mistero nomita vivo, ŝi komprenis, ke pli grava devo ol tio por ŝi ne estas. Ŝi konsciis, ke ŝia patro, ke tiu preskaŭ nekonata al ŝi homo, same naskiĝis kiel multaj aliaj, vivis kaj lin elektis la sorto por doni al ŝi la vivon kaj ŝi estas devigita ekscii almenaŭ kie troviĝas lia tombo.

Ŝi komencis serĉi, demandi, skribi. Ŝi esprolis preskaŭ la tutan historion de la Bulgara Armeo dum la Dua Mondmilito. Ŝi sciis parkere fremdlandajn regionojn, lokojn de bataloj kaj atakoj, nomojn de batalionoj kaj rotsekcioj, nomojn de generaloj, koloneloj, simplaj soldatoj.

Ŝi skribis leteron post letero al diversaj hungaraj urboj kaj vilaĝoj, sed respondoj ne venis aŭ se

hazarde venis iu respondo, ĝi estis lakona kaj ofica — kelkaj tajpitaĵoj linioj klarigis, ke neniaj informoj estas pri tiu soldato kaj sub ili malklaris subskribo kaj stampo. Jes, post tiom da jaroj la tuta afero montriĝis senseca kaj vana.

La filinoj de Lina komencis kaŝe primoki ŝin, la edzo unue miris, poste lasis ŝin kaj plu tute li ne interesiĝis al kiu ŝi skribas, kion ŝi ricevas. Verŝajne li opiniis, ke por ŝi tio igos laspeca okupo, kiel por la aliaj virinoj en ŝia aĝo — la libroligado, la trikado aŭ promonado. Jes, por la filinoj kaj la edzo tio eble estis stultaĵo, sed por ŝi — filina devo.

„Ja, neniu povas senspure malaperi — meditis Lina febre. — Ie, sur la tero devas resti almenaŭ ŝtono aŭ arbo, kiu montru, ke li vivis, ke li estis. Post mi neniu scios ion pri li kaj mi devas serĉi kaj trovi lian tombon.“

Foje konato konsilis ŝin sendi anoncon al iu ĵurnalo. Lina longe hezitis, sed tio verŝajne estis la lasta ebleco. Iu hazarde tralegus la anoncon kaj skribus al ŝi.

Post kelkaj semajnoj la anonco aperis. Vere, ĝi estis dulinia, sed klare diris, ke se iu, dum la Dua Mondmilito, soldatservis en la dektria rotsekcio de la Unua Armeo kaj scias ion pri la pere de Ivan Kirilov, bonvolu skribi al lia filino. Sub la anonco legeblis la nomo kaj la adreso de Lina.

La monatoj pasis. La vintro foriris, la printempo same rapidis al sia fino, sed nenio reago venis. Verŝajne neniu jam memoris la numeron de la ĵurnalo, en kiu aperis la anonco. Nur Lina zorge gardis ĉi malnovan numeron kaj de tempo al tempo ŝi prenis ĝin el la skribtabla tirkesto kaj silente relegis la du mallongajn sekajn frazojn. Ŝi ne sciis kial, sed ŝajnis al ŝi, ke en ĉi eta anonco kaŝis sin iu espero. Kvazaŭ io en la vortoj aludis al ŝi, ke nepre iu tralegos la anoncon kaj ion novan ŝi ekscios pri sia patro.

Estis lunde matene, kiam Lina trovis en la poŝkesto la leteron. Ordinara koverto, iom ĉifita, la adreso skribita per grandaj neegalaj literoj, certe la mano de la skribinto iom tremis, eĉ ŝia nomo estis erarita, anstataŭ Lina, la sendinto skribis Kina, sed dank' al Dio la strato, la numero estis ĝusta.

Maltrankvile Lina malfermis la koverton. Skribis al ŝi sepdekjara viro el fora vilaĝo apud Danubo. Per kelkaj frazoj li klarigis, ke kune soldatservis kun ŝia patro kaj la nokton de la 16-a de marto ili kune estis en la patrolgrupo, kiu pro malamika embusko disigis. Li ne certas ĉu ŝia patro tiam pereis, sed ŝi povus kontroli tion, ĉar la embusko okazis apud la hungara vilaĝo Szentmiklós. La letero finiĝis per la vortoj:

„Estime, kunbatalanta amiko de Via patro Angel Dado.“

Vere, la letero iom trankviligis Lina, sed nenion novan ĝi diris al ŝi. Pri tiu ĉi vilaĝo ŝi tre bone sciis. Ankaŭ aliaj diris, ke ŝia patro verŝajne pereis tie kaj eble ĉe tie estas lia tombo, sed jam antaŭe ŝi skribis kelkajn leterojn al la vilaĝa konsilio kaj kelkfoje ricevis afablajn respondojn, ke en la regiono de la vilaĝo ne estas tomboj de pereintaj bulgaraj soldatoj dum la milito.

„Tio estis la lasta letero, kiu mi ricevis“ — meditis Lina.

Eĉ la anonco en la ĵurnalo ne alportis ion novan. Ŝi deziris trankviliĝi kaj plu ne pensi pri tio, sed foje ŝia amikino ekhavis strangan ideon.

— Ĉu vi scias, ke mi estas esperantistino — diris Mila. — Ni skribu leteron al iu esperantisto, kiu loĝas en proksima urbo kaj ni petu lin kontroli ĉu en tiu vilaĝo hazarde ne estas tombo de pereinta bulgara soldato.

Skeptike Lina alrigardis ŝin.

— Ja, kelkfoje el la vilaĝa konsilio oni respondis, ke tie ne estas tomboj de pereintaj bulgaraj soldatoj.

— Tamen ni provu — insistis Mila.

— Ĉu vi persone konas la homon, al kiu vi skribos la leteron? — Ne, sed li aŭ ŝi estas esperantisto.

— Mila, kiel vi naivas. Oficiale laŭ instancoj faris nenion kaj hazarda homo nepre respondos al nia stulta letero.

— Vi ne pravast! — reagis Mila kaj provis konvinki ŝin, sed vane.

Lina jam nenion kredis. Neniu komprenis ŝian doloron. La filinoj, la edzo kaŝe primokis ŝin kaj ĉu tute nekonata homo, el fora lando, lasos ŝian ĉiutagan laboron por serĉi tombon, kiu eble ne ekzistas aŭ neniam ekzistis.

Tamen en Mila kvazaŭ ekbrulus ia fanatika ambicio. Ŝi decidis pruvi ion al Lina, kio aspektis tiel naiva, ridinda, ke eĉ infano ne kredus je ĝin.

Iun vesperon Mila alportis poŝtformatan libron.

— Jen la jarlibro — iel fiere diris Mila. — Ĝi enhavas la adresojn de la Esperanto-delegitoj el diversaj landoj de la mondo.

Lina ne tre bone komprenis kion signifas „jarlibro“, „Esperanto-dele-

gitoj“, sed ŝi ne demandis. Ŝin nur mirigis la neordinara emocio en la vortoj de Mila.

— Do, mi trovis adreson de delegito, kiu loĝas en urbo, proksima al la vilaĝo, pri kiu vi parolas — daŭrigis Mila. — Lia nomo estas Imre Csatlós, kvindekjara inĝeniero kaj tuj ni skribos al li leteron.

— Kaj tuj li respondos. . . — aldonis Lina ironie.

— Kompreneble!

— Ho kara mia, kiu inĝeniero trovos tempon por respondi al stultulino aŭ naivulino kiel mi.

— Mi plu ne parolos — ofendiĝis Mila. — Donu paperon kaj diktu la leteron!

Dum duonhoro la letero pretis. La enhavo estis preskaŭ la sama, kiun Lina jam multfoje skribis bulgare, hungare, eĉ germane. Post la subskribo de Lina, Mila atente faldis la paperon kaj antaŭ ol ŝovi ĝin en la koverton, aldonis iun verdan bileton.

— Kio ĝi estas? — scivolis Lina.

— Respondupono — lakone diris Mila.

Ankaŭ tiun vorton Lina ne bone komprenis, sed ŝi konjektis, ke eble ĉi bileto estis iaspeca rekompenco aŭ io simila.

— Jen la letero — triumfe diris Mila. — Morgaŭ sendu ĝin kaj atendu la respondon.

— Dankon — skeptike ekridetis Lina kaj lasis la leteron sur la tablon.

La sekvan tagon la letero jam flugis al Hungario, sed Lina sendis ĝin tute senespere. Ŝi certis, ke same ĝi malaperos senspore, kiel malaperis tiom da ŝiaj leteroj, petoj, esperoj. Ŝi jam sciis, ke dum vivos, ŝi ne povos plenumi la lastan peton de ŝia patrino.

Tamen la respondo venis. La eksterlanda koverto estis adresita al ŝia nomo kaj Lina haste malfermis ĝin. La unupaĝa letero estis diligente skribita, per trankvila, eĉ bela skribmaniero. Lina provis ion tralegi, sed el la tuto komprenis nur la vorton „sinjorino“. Verŝajne la nekonata esperantisto komencis la leteron per la vortoj „estimata sinjorino“ aŭ iel simile.

Malgraŭ ke ŝi havis laboron, ŝi lasis ĉion kaj tuj ekiris al la domo de Mila. Kiam Lina montris la leteron, la okuloj de Mila tiel ekbrilis, kvazaŭ la letero estus skribita kaj adresita ne al Lina, sed al Mila. Ĉio, la gesto per kiu Mila prenis la leteron, la ekscito per kiu ŝi komencis legi ĝin, emfazis nur solan frazon:

— Ĉu vi vidis, nekredema Tomaso?

Subite febra malsaneco obsedis Lina kaj malgraŭ ke ĝis ĉi momento ŝi estis trankvila kaj certa, ke nenion gravan enhavas la letero, ŝi komencis tremi kaj preskaŭ ploure ekpetis:

— Bonvolu traduki, traduki. . .

Triumfe, malrapide Mila komencis traduki. La nekonata inĝeniero skribis, ke li estis en Szentmiklós, detale kontrolis ĉion, sed bedaŭrinde li trovis nenion. Tamen li ne perdas esperon. Proksime al Szentmiklós situas alia vilaĝo, kies nomo estas simila, Alsószentmiklós, kaj venontsemajne li kontrolos tie, ĉar ŝajnas al li, ke tie pli eblas trovi ion. Fine li petis ankoraŭ iom da pacienco kaj elkore salutis ŝin, Lina.

Lina ne kredis al siaj oreloj. Ne eblis. Nekonata persono ne povis skribi similan leteron. Aŭ tiu mistera inĝeniero trompe trankviligis ŝin aŭ Mila ne tradukas ĝuste, por ke ne senrevigi ŝin.

— Ĉu finfine vi kredas? — demandis Mila triumfe.

— Jes — respondis Lina seke kaj prenis la leteron.

Ne. Ŝi ne kredis al la traduko de Mila kaj reveninte hejmen, ŝi tuj iris serĉi iun Esperantan vortaron. Ne estis facila afero. En preskaŭ ĉiuj urbaj librovendejoj ne troviĝis simila vortaro, sed Lina firme decidis mem kontroli la enhavon de la letero. Finfine ne restis alia solvo, krom serĉi la vortaron en la urba biblioteko. Felice tie estis sola ekzemplero kaj iom malfacile la bibliotekistino konsentis por kelkaj tagoj prunti ĝin al Lina.

La traduko okazis ŝvita laboro, sed Lina sukcesis deĉifri la leteron. Ne estis dubo. La nekonata viro asertis, ke li kontrolis ĉion kaj denove skribos al ŝi. Tamen iel Lina nepre devis respondi al li kaj almenaŭ danki lin pro la afableco. Ŝi ne deziris plu ĝeni Mila, sed por la respondo la vortaro ne sufiĉis. Bezonata estis lernolibro.

La sekvan tagon matene Lina denove vizitis la bibliotekon. Nun la bibliotekistino estis pli afabla kaj tuj pruntis al ŝi lernolibron.

Kelkajn tagojn Lina febre trafolumis la lernolibron. Evidente tiu ĉi lingvo ne estis tre malfacila. Finfine, post kelkaj provoj, la respondo pretis. Vere, ke ĝi konsistis nur el kvar frazoj, sed Lina sentis sin senlime feliĉa. Sola, sen iu ajn helpo ŝi sukcesis kompili la respondon kaj mem danki al la nekonata afabla persono.

La dua letero ne malfermis, Imre Csatlós skribis, ke pasintsemajne li ne havis tempon kontroli en Alsószentmiklós, sed denove li petis paciencon. Ankaŭ nun Lina leterdankis al li, uzante preskaŭ la samajn frazojn, sed aldonis al ili ankoraŭ du novajn, kiujn dume ŝi elernis.

Tamen atendente la respondojn, iel nesenteblo ŝi eklernis la novan lingvon. Io alloga estis en ĝi kaj profunde en si mem Lina komencis senti fortan inklinon al ĝi.

Senpacience ŝi atendis la leterojn de Imre Csatlós, sendepende de la novaĵoj, kiujn ili alportus al ŝi. Iel strange tiu nekonata viro en-

ris ŝian vivon kaj jam Lina ne povis imagi kiel ŝi vivus sen liaj leteroj. Kiu li estis? Kiel tiel forte li deziris helpi al ŝi? Ja, al ĉiuj ŝiaj antaŭaj leteroj oni respondis nur per kelkaj sekaj, oficaj frazoj. Ŝi ne sciis kiel aspektas tiu hungara inĝeniero, sed ŝi kvazaŭ vidus lian vizaĝon, liajn okulojn kaj ŝajnis al ŝi, ke li iom similas al ŝia patro; kun samaj tatarformaj okuloj, brilaj kiel karbetoj, kun samaj densaj lipharoj kaj rideto, kiu aludas pri lia ĉama bonhumoro.

Nokte Lina pli ofte vekigis kaj vere ŝi ne sciis kiun fakte ŝi vidus — ĉu la patron aŭ Imre Csatlós? Apud ŝi trankvile dormis ŝia edzo kaj ege mallaŭte Lina flustris al si mem:

— Dio mia, kiel okazis tio? Ja, mi estas kvindekjara, mi havas edzon, du agajn filinojn. Ĉu vere eblas tio? Neniam mi vidis lin, sed kvazaŭ tutan vivon mi estus kun li, eĉ ŝajne mi jam pli scias pri li ol pri mia edzo, kun kiu tridek jarojn ni loĝas kune.

Foje, kiam ŝi kombis sian hararon antaŭ la spegulo, ŝi surprize konstatis, ke io en ŝi ŝanĝiĝis. Mola lumo radiis el ŝiaj bluaj okuloj kaj la profunda laga trankvilo videblis en ŝia rigardo. Varmigis ŝin la penso, ke ie malproksime, tute nekonata viro vivas kun ŝiaj problemoj, kun ŝia doloro. La filinoj delonge jam ne interesiĝis pri ŝi, la edzo nur silente kaj moke rigardis kiel ŝi ĝis noktomezo lernas la lingvon kaj skribas la leterojn. . . Kaj li, Imre Csatlós, ne nur respondis al ŝiaj leteroj, sed trovis tempon diri kelkajn vortojn pri si mem, pri sia laboro. Nur tion Lina ne supozis, nur tion ŝi ne atendis. Ofte obsedis ŝin febro. En tiuj momentoj ŝi deziris tuj ĉesigi la korespondadon, kiu jam aspektis kiel malĉifileco al la edzo, sed post la ricevo de nova letero, ŝi ne havis forton kaj tuj sidis skribi la respondon.

Estis suna maja mateno, kiam alvenis la plej atendata letero. Maltrankvile Lina malfermis ĝin. Post la tralego de la unua frazo, ŝiaj manoj ekstremitis.

Kara Lina,

Hodiaŭ mi trovis la tombon de Via patro. . .

Varmaj larmoj nebuligis ŝiajn okulojn kaj plu nenion ŝi vidis. Senforta, pala ŝi sidis sur la seĝon apud la tablo.

Post kelkaj minutoj ŝi daŭrigis la legadon. Imre detale klarigis kie kaj kiel li trovis la tombon, kion li faris kaj fine li proponis al ŝi tuj ekveturi al Hungario.

La varma nebulo denove vualis ŝian rigardon kaj antaŭ ŝi Lina kvazaŭ vidus viron kun ridantaj tatarformaj okuloj kaj densaj lipharoj, sed kiu li estis — ĉu la patro aŭ Imre Csatlós?

Vilaĝo Pisanica, la 14-an de aŭgusto 1987

AMIKECO KUN PROFUNDAJ RADIKOJ



Juhan Våljaots — la unua en la dua vico dekstre, dum kongreso de BLSDP, Plovdiv, julio 1904. En la mezo: Dimitar Blagoev (Djado).

En 1984 en la ĉefurbo de Soveta Estonio Tallinn gastrolis bulgara arttrupo. La trupo ĉie ĝuis koran gastamon, kio ankoraŭfoje atestis pri la tradiciaj amikaj rilatoj inter niaj popoloj.

Estas konate, ke en la vicoj de la liberiga rusa armeo, batalanta kontraŭ la turkaj milittrupoj antaŭ pli ol cent jaroj sur montopinto Sipka estis pli ol kvar mil estonoj, formantaj la t. n. „Revelskij polk“. Multaj el ili famigis pro sia braveco kaj ankaŭ multaj estonaj nomoj troviĝas sur la muroj de la konstruita sur Sipka memorensmblo. La famaj historiaj bataloj de tiu milito trovis eĥon en la tiutempa estona gazeto, en la folkloro kaj literaturo. La herooj de tiu milito restis por ĉiam en la memoro de la estonoj, la partoprenintoj en ĝi ĉie ĝuis grandan estimon ĝis kiam ili vivis?

Estas konata fakto, ke la bulgaro Dimitar Blagoev en la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento, studente en Petrogrado, organizis tie la unuajn marksistajn rondojn kaj estis unu el la fondintoj de la Rusa Socialdemokrata Partio. Malmulte konata estas la fakto, ke estono Juhan Våljaots, ekloĝinta en la fino de la pasinta jarcento en Plovdiv, farigis unu el la plej proksimaj kunlaborantoj de „djado“ Dimitar Blagoev kaj unu el la fondintoj de Bulgara Socialdemokrata Partio — la nuna Bulgara Komunista Partio. Ankaŭ liaj posteuloj estis aktivuloj de la bulgara laborista movado. (S. Isakov: Juhan Våljaots. „Eesti Raamat“, Tallinn 1981).

Kune kun rusoj bulgaroj estis inter la unuaj, kiuj komencis lerni kaj popularigi la internacian lingvon Esperanto. Samtempe la movado trovis adeptojn ankaŭ en Estonio. Ekde la unuaj jardekoj de nia jarcento, dank' al la eminenta bulgara esperantisto Ivan Krestanov, estas starigitaj perleteraj kontaktoj inter bulgaraj kaj estonaj esperantistoj. La konata E-poetino Hilda Dresen rakontas en sia aŭtobiografio, ke en la komenco de ŝia kaj ankaŭ de ŝia fratino Helmi Dresen, Esperanto-aktivado gravan rolon ludis leteraj, poste ankaŭ personaj kontaktoj kun tiutempaj bulgaraj E-aktivuloj (Sapungiev, Mladenov-Hans k. a.). Tiujn kontaktojn ĉesigis la Dua Mondmilito. Ili rekomenciĝis en la 50-aj jaroj (Georgi Dimov, Asen Grigorov k. a.) kaj daŭris ĝis la morto de Hilda Dresen (1981). Kiam en la jaro 1957 ekaperis revuo „Nunttempa Bulgario“, ĝi farigis ĉiunonata festo de niaj esperantistoj dum pli ol dek jaroj. Nun „Bulgara Esperantisto“ estas multe ŝatata E-revuo ne nur ĉe ni, sed en tuta Sovetunio. Ĉiu sovetia esperantisto scias, ke Bulgario estas Esperanto-avangardo en la mondo, ke la rolo de bulgaraj esperantistoj estas tre grava por nia movado. Multaj sovetiaj esperantistoj havas korespondamikojn en Bulgario. Pro tio ĉiam kun granda ĝojo ni renkontiĝas kun bulgaraj esperantistoj, kiuj rakontas al ni pri la vivo en socialisma Bulgario.

P. L.,
Tallinn

LAŬ GABROVA ADRESO

Interesa kaj enhavoriĉa estas la aktivado de Elena Kovaĉeva — elstara esperantistino el Gabrovo. Deŝiinta sian tutan vivon al Esperanto kaj al internaciaj kontaktoj, en la nomo de paco kaj amikeco, ŝi multe kontribuis por kreo ĉe alilandanoj de fidela imago pri Bulgario, por ekkono de la animeco de la bulgarioj, de la beleco de niaj vivmaniero kaj realaĵo.

Kara estas por Elena nia hodiaŭa realaĵo. Si neniam forgesos kiel en 1923 en urbo Lom ŝi komencis lerni la malpermesitan de la faŝista registaro lingvon. Vivaj estas en la memoro de Elena ŝiaj amikoj-komunistoj — fervoraj propagandantoj de Esperanto ankaŭ en la malliberejoj ĉeloj.

Post la Naŭseptembra venko en 1944 Elena Kovaĉeva estas aktiva sociagantino kaj esperantistino, ŝi korespondas kun personoj el 50 landoj de Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio. Ŝi mem depost 20 jaroj estas membro de UEA.

Pli ol 7200 leteroj, miloj da poŝtkartoj, albumoj, katalogoj, libroj, notoj kaj unika kolekto el 200 pupoj estas la respondo de ŝia deziro pri sinceraj kontaktoj. Laboristoj, sciencistoj, pentristoj, instruistoj kaj lernantoj el la tuta mondo, interligitaj per la ideoj de Esperanto, malkovras Bulgarijon kaj rakontas pri siaj landoj.

La entuziasmo de Elena allogas junulojn kaj maljunulojn. La aktiva agado de la gvidata de ŝi junpionira E-rondo altiras la atenton de vico da emmentuloj de nia tempo. La leteroj ricevitaj de Ho Chi Minh, Janos Kadar, Secou Toure, Paul Robeson estas vera rekono pri la aktivado de la bulgaraj esperantistoj.

La intereso de Elena Kovaĉeva al la moroj kaj kutimoj, al la folkloro kaj vestoj de la popoloj estas la motivo por kreo de ŝia rimarkinda kolekto el pupoj kaj figuroj. Per multe da beleco kaj eleganteco ravas la multnombraj pupoj el Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Japanio, Mozambiko, Brazilo, Kolumbio, Kanado, Francio, eĉ el Laplando.

Junuloj kaj plenaĝuloj ĉiutage vizitas la gastamandon de Elena Kovaĉeva. La ekspozicioj el ŝiaj pupoj kaj memoraĵoj estas vizitataj kun intereso de la urba publiko.

Dimităr VIKTOROV
(el ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“,
24. 10. 1987)

NOVAĴOJ EL UNUIGINTAJ NACIOJ

Kiel vi certe scias, UEA havas konsultan statuson kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu statuso donas al ni okazon interveni oficiale en la aferojn de UN por prezenti la starpunkton de nia Asocio kaj por atentigi pri Esperanto.

Aperigante la informojn, kiujn ni sendas al vi, ankaŭ vi ne-
rekte helpas la situacion de UEA ĉe UN.

BATALO KONTRAŬ LOKUSTOJ

Svarmoj de lokustoj, multiĝante pro abunda pluvo post jaroj de sekeco, grave minacas dekkvinon da landoj en centra kaj suda Afriko. La Organizaĵo de UN pri Nutrado kaj Agrikulturo starigis Krizan Centron por Kontraŭlokusta Agado

en 1986 por kontroli, kunordigi kaj realigi limigan agadon.

AGRIKULTURA FONDUSO

La Internacia Fonduso por Agrikultura Disvolvado (IFAD), kiun UN kreis antaŭ ok jaroj, aŭspicias projektojn por subteni malgrandajn farmbienojn kaj sengrundajn malriĉulojn en landoj kun malgranda en-

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO:

Junularo „Rabotniĉesko Delo“ (18. XII. 1987) aperigis informon de sia propra korespondanto el u. Ŝumen pri esperantaj kursoj kaj pri la internacia korespondado de la esperantistoj en tiu urbo; j. „Oteĉestven Front“ (18. IX. 1987) presis informon de Atanas Ilkov pri tradicia tutlanda turista E-festo ĉe montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa-monto; La sama ĵurnalo (28. X. 1987) informas pri la nova bulgarlingva periodaĵo de BEA „Informacia Esperanto“; j. Trud (26. X. 1987) donas lokon de raporto de Georgi Niklev pri lerneja E-ensemblo en la sofia mezlernejo „N. Vapzarov“; La semajna gazeto „Trezenost“ (13. XI. 1987) publikigis recenzon de Todor Lambov pri la bulgarlingva libro „Esperanto 100-jara“ de Nikola Alekŝiev; la monata ilustrita revuo de Bulgara Blindula Asocio „Zari“ (Kajero 8, aŭgusto 1987) disponigis lokon al tri artikoloj kaj du fotoj pri Esperanto; pri centjarigo de Esperanto de Angel Sotirov, pri Esperanto inter blinduloj en Bulgario de Danĉo Danĉev kaj pri tutlanda scienca konferenco je temo „Esperanto kaj blinduloj“ de Slava Ganeva; La monata gazeto „V Zaŝtita na Mira“ (kajero 11. nov. 1987) aperigis artikolon „La junaj esperantistoj defendas la pacon“.

EN LA LANDO:

Ĵurnalo „Oteĉestven Glas“ — u. Plovdiv (4 kaj 10. V. 1987) aperigis informojn pri la tradicia Esperantista Internacia Fira Renkontiĝo en u. Plovdiv; La sama ĵurnalo (6. V. 1987) informis pri ekspozicio „100 jarojn Esperanto“ en la urbo; la sama (8. V. 1987) aperigis grandan intervjuon kun Hristo Gorov, tiama prezidanto de BEA. La intervjuon faris Mihail Milĉev; La sama ĵurnalo (4. VI. 1987) informas pri internacia junulara esperantista laborbrigado en u. Karlovo; j. „Borba“ — u. Veliko Tŕrnovo (19. XI. 1987) aperigis grandan artikolon „Cent jarojn urbo Veliko Tŕrnovo parolas Esperanton“ de Olga Cankova kaj informon pri jubilea solenaĵo en u. Polski Trŕmbeŝ de Tatjana Petrova; j. „Ŝumenska Zarja“ — u. Ŝumen (6. XI. 1987) informas per la pumo de Cvjatko Todorov pri esperanta solenaĵo omaĝe al la 70-jariĝo de la Oktobra Revolucio; La sama ĵurnalo (13. XI. 1987) presis grandan artikolon de Julian Petrov pri la impona internacia korespondado de esperantista familio Kiŝ el u. Ŝumen; La gazeto de la konstruantoj de la akvokaskado „Belmeken“, aperanta sub la nomo „Belmeken-Sestrimo“ en v. Sestrimo (19. VII. 1987) aperigis artikolon de Rosica Dimitrova pri la centjara jubileo de Esperanto; La sama gazeto en du numeroj (20. XI. kaj 7. XII. 1987) aperigis grandan raportojon de Jordan Nikolov pri la 72-a Universala Kongreso en Varsovio.

spezo. La 137 projektoj de IFAD helpas entute 10,5 milionojn da familioj.

POPULACIO

En 1987 la monda enloĝantaro atingis kvin miliardojn, laŭ la Fonduso de UN pri Popolacia Agado (FUNPA). FUNPA helpas evoluantajn landojn nombri siajn enloĝantojn, starigi politikon pri loĝantaro kaj plenumi tiun politikon. Tiu laboro kontribuas al falo de homa fekundo en partoj de Azio kaj Latinameriko. La monda enloĝantaro atingis unu miliardon en 1830, du miliardojn en 1930, tri miliardojn en 1960, kaj kvar miliardojn en 1975.

Oficejo por rilatoj kun UN-Novjorko



„ARTA KLUBO“ — TRIJARA

Antaŭ tri jaroj estis fondita nia „Arta Klubo-84“. Kia estas la trapasita de ni vojo? Kion ni atingis?

Ĉe la Klubo estis formitaj tri grupoj: literatura, pentrista kaj kanta. Membroj de nia klubo estigis verkemaj esperantistoj el Plovdiv kaj aliaj najbaraj urboj. Al nia klubo aliĝis ankaŭ esperantistoj el Gdansk (Pollando), Ufa (USSR) kaj el Budapeŝto (Hungario).

Dum sia tri-jara ekzistado „Arta Klubo-84“ kelkfoje havis renkontigojn kun la Literatura Rondo „Asen Grigorov“, Sofio. En septembro pasintjare ni gastigis ĝian membron Marin Bačev, kiu legis siajn E-verkojn antaŭ la plovdiva esperantistaro. Nia klubo bone sin prezentis en Jambol kaj ankaŭ dum sia gastado en urbo Stamboliĵki. La klubo programo temis pri la 150-jara datreveno de la naskiĝo de Vasil Levski kaj pri la 100-jara jubileo de Esperanto. Nijaj membroj el Gdansk prezentis ekspozicion „1300-jariĝo de Bulgario“. La festa vespero estis aranĝita per materialoj senditaj el Plovdiv.

Sed la klubo agado estis plej aktiva en nia urbo — Plovdiv. Ni ofte organizis legadojn de verkoj de klubanoj. Ne unufoje ni okazigis literaturajn kunvenojn lige kun diversaj datrevenoj.

Dum la lastaj du jaroj nia Klubo kunlabore kun la urba E-societo „Kulturo“ sukcese realigis larĝan programon por celebore de elstaraj plovdivaj geesperantistoj, lige kun la centjariĝo de Esperanto. Dum tiuj vesperoj estis prezentitaj prelegoj kaj literaturaj programoj. Estis celebrataj Ivan Bataklijev, Atanas Sopov, Elena Vaskova, Ana Pehlihanova, Toma Ajolov, Hristo Dodov k. a. Antaŭstaras la vesperoj dediĉitaj al niaj neforgeseblaj samideanoj Dimitar Malčev kaj Penko Stoev.

Nia pentrista grupo aranĝis kelkajn ekspoziciojn en la salonoj de legosocieto „Salom Alejhem“ kaj de IV kvartalo de la Plovdiva komunumo. Bildoj kaj afiŝoj pri pereintaj esperantistoj-antifaŝistoj el Plovdiva regiono estis ekspoziciitaj ankaŭ en aliaj lokoj ktp. Dum la malfermo de la ekspozicioj multe aktivis nia Literatura Grupo, gvidata de Lili Sotirova. Dank' al la gvidanto de la Pentrista Grupo D. Danev estis preparitaj salutadreso. Similan adreson kune kun konvenaj literaturaj materialoj la estraro de „Arta Klubo-84“ prezentis al la Esperanto-grupo el Leningrado. D. Danev ankaŭ preparis la kluban emblemon.

La membroj de nia Klubo verkis ne malmulte da vesafoj kaj plurajn verkojn tradukis en Esperanton. Per versafoj la plovdivaj artklubanoj partoprenis diversajn konkursojn (Haskovo, Jambol, Sofio, Plovdiv k. a.), kie ili gajnis premiojn. Grava momento en la vivo de „Arta Klubo-84“ estis la eldono de la libro „Mia trezorejo“ verkita de nia plej maljuna kaj plej malnova membro Ivan Sivarov, eksa ĵurnalisto kaj spertulo en la lingvo.

Grava rolo en la vivo de nia Arta Klubo ludas ankaŭ nia kantgrupo. Ĝi estas gvidata de la aktorino Stefka Stamatova. Ĝi komponis la melodion de „Alvoko“ de „Arta-Klubo-84“.

Varia kaj riĉa estis la agado de „Arta Klubo-84“. Multo estis farita kaj pluraj novaj taskoj staras antaŭ ni. Baldaŭ Plovdiv havos sian propran Esperanton. Kun tio la ebloj pri pli larĝa kaj aktiva agado de la Arta Klubo kreskos.

La 13-an de novembro p.j. estis aranĝita festa kunveno lige kun la 3-jara datreveno de la fondo de nia Klubo. Vice kun la originalaj versafoj, originala Esperanto-prozo kaj E-tradukoj de plovdivaj artklubanoj, eksonis ankaŭ la versafo „Mia piano“ de sofianino Antoaneta Atanasova, versafo de Penka Papazova, Jambol, sendita al nia Klubo. Deklamis Slavka Sokolova. En sia jarraporto la klubo prezidanto dankis al ĉiuj, kiuj aktivis dum tiuj tri jaroj. Meriton por la bona funkciado de la Klubo havas ankaŭ ties sekretariino Elena Hristodulova.

At. KRUMOV,
prezidanto de „Arta Klubo-84“

RENKONTIGO KUN VETERANOJ

Emocia estis la solenafo dediĉita al la veteranoj-esperantistoj, kies dommastro estis E-societo „Diĉo Petrov“ en Ĉepelare. La arango okazis en la urba legejo „Rodopska iskra“ (Rodopa Fajrero) la 30-an de novembro pasintjare. Ĉeestis veteranoj el Smoljan-komunumo, gastoj el E-societo „Kulturo“ en urbo Smoljan, lernejanaro kaj loĝantoj de Ĉepelare.

Milko Mačokov — prezidanto de DE de BEA en Smoljan, rakontis pri la laboro de la 72-a UK en Varsovio.

Lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto kaj la 80-jariĝo de BEA, per insignoj „Veterano“ estis distingitaj ok esperantistoj el Ĉepelare, ses el Smoljan kaj po unu el Zlatograd kaj v. Ĉokmanov. En la nomo de la veteranoj dankis Dimitar Marev — prezidanto de la Veterana Klubo en Smoljan-komunumo. La distingitoj salutis Petar Panov — prezidanto de E-societo „Diĉo Petrov“.

Artprogramon prezentis la ensemblo por E-parolo kaj kanto „Zvanĉe“ (Sonorileto) — gajninto en la Nacia Revuo por E-Parolo kaj Kanto „Jambol-87“, kun gvidanto Nikolina Takova.

Maria DIČEVA

NOVAĴOJ EL VARNA

Printempe de la pasinta jaro M. Trānkova — direktorino de la lingva gimnazio „Frederic Joliot Curie“ en Varna invitis la direktoron de la Internacia Esperanto-Kursejo en la urbo Georgi Ĉvetkov paroli antaŭ la gelnantoj pri la 100-jariĝo de Esperanto kaj pri la E-kongreso en Pekino. Dum pli ol 30 minutoj G. Ĉvetkov sukcesis teni la atenton de la gelnantoj per sia interesa rakonto. Post lia parolado ing. Pavel Elenov kaj Stanĉo Stankov, la nova prezidanto de la Instruista Klubo ĉe la urba Esperanto-societo „Albatroso“ prezentis kolorajn diapozitivojn pri la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. Rezulte ekestis granda intereso pri Esperanto. La saman printempon 100 gelnantoj el la lingva gimnazio vizitis la Internacian E-Kursejon en Pisanica dum 10 tagoj.

La 2-an de decembro 1987 en la granda salono de la gimnazio Georgi Ĉvetkov denove alparolis la gelnantojn kaj informis ilin pri la grandaj eblecoj, kiujn donas Esperanto al personoj, kiuj ĝin posedas. Li parolis ankaŭ pri la etoso, kiu regis dum la 72-a Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio. Poste li donis la parolon al la kursgvidanto doc. Georgi Dimov, kiu malfermis E-kurson laŭ la Ĉseh-metodo por ĉirkaŭ 50 entuziasmaj gelnantoj. Ekzistas intereso pri Esperanto ankaŭ inter la instruistoj. Baldaŭ estos malfermita kurso speciale por ili.

La semojn semitajn dum printempo oni rikoltas aŭtune!

Doc. Georgi DIMOV



BULGARIO

INA TASEVA (12-jara) — Rakitovo, Pazargik-komunumo, str. Svoboda 11 — kun ĉi pri ĉi. Kolektas BK. MARIN TODOROV PALAZOV (40-jara) — V. Tarnovo, str. Javorov 15-a — kun ĉi pri ĉi. Ing. VESELKA KAMBUROVA (30-jara) — str. Madara 2, v.h. B, Gorna Orjahovica — kun ĉi pri ĉi.

RUMANIO

HARAGA IOAN (37-jara) — Micro 3, blok A-3, ap. 38, R-5100, Buzau, Roman'a — kun bulgaroj pri ĉi.

HUNGARIO

KOVACS JOZSEF (18-jara) — Magyarország, Hatvan, Béke ut. 52.3000. — kun 14-18-jaraĝaj knabinoj el ĉi pri ĉi. ZOLTANO KOVACS (27-jara) Ajka po Box 49, H-8400 — kun ĉi pri PM, BK, literaturo. Deziras vojaĝi per la helpo de Esperanto.

IRAN

HASSAN NORI (39-jara) — Talghani str. 26, IR-43391 KHOSHKBJDJAR Gilan, I — kun ĉi pri ĉi. Kolektas BK kaj PM.

USSR

Nova E-klubo serĉas kontaktojn kul ĉi. Skribu al: 235000 JONAVA-I a. k. 24, Krivickiene Laima, Litovio, USSR. EDITA BAGDONAITE (17-jara) — Litovio, Anyksciai 234930 Kvarco, 40 — kun ĉi pri literaturo, kino, arto.

NI KONDOLENCAS

Nia movado perdis unu el siaj sindonaj aktivuloj — Dimitar Milev.

Naskita la en la Rodopa vilaĝo Skobeleva, li kiel adoleskano ekloĝis en Plovdiv kaj fariĝis helpanto de tajloro. En 1928, kiam estis fondita la Laborista Junulara Unuiĝo, li fariĝis ties agema membro. La saman jaron li komencis lerni Esperanton en la Domo de Metiistoj kaj en 1930 aliĝis al la Laborista Esperanto-Asocio.

Dum la Dua Mondmilito Milev disponigis sian domon al funkciuloj de la Partio. En 1941 li partoprenis taĉmenton, kiu provis penetri en la koncentrejon Gonda Voda, por liberigi la arestitajn kamaradojn. La atako fiaskis kaj Milev kun partoprenintoj estis arestita kaj kondamnita je longjara punlaboro. Pasiginte tri jarojn en la pundo, li sukcesis eskapi kaj batali kiel partizano. La Naŭan de Septembro 1944 li partoprenis la antifaŝistan ribelon. En la sekvaj jaroj li fordonis siajn kapablojn al konstruado de la socialismo. Li laboris sindone kiel membro de la Distrikta Estraro de BEA en Plovdiv.

Ni kliniĝas antaŭ la hela memoro de nia samideano Dimitar Milev.

Hristo GOROV

II Nacia jubilea MEM-konferenco (Vasja Cvetkova)

- 1 Komune — por paca mondo kaj kunvidado!
- 3 Berthelot, la fondinto! (Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux)
- 5 Niaj jubileuloj: Prof. Guĝev — 85-jara (Ljubka Mandalova), Gratulojn, amiko Pilevl (Penjo Stojanov)
- 6 Lingvaj demandoj: Pri la nomado de gentoj kaj landoj (Bernard Golden), Komparo de la projekto pri „Monda Skribo“ kun Esperanto (Dimitar Haĝiev)
- 7 In memoriam: Forpasis ege rimarkinda esperantisto (Nikola Aleksiev)
- 8 Ni recenzas: Kortuŝa humaneca libro (Nadija Andrianova), Vera saluto (Maria P. Angelova)
- 8 Sub hispana ĉielo (Donĉo Hitrov)
- 10 Nia intervjoo: Esperanto-trezorejo en Vieno (Evgeni Georgiev)
- 12 Novelo: Korrespondo (Georgi Miĥalkov)
- 14 Amikeco kun profundaj radikoj (P. L.)
- 15 Leteroj de korespondamiko, Tra la gazetaro
- 16 Enlanda movado

IV Distroj

Sur la unua kovrilpaĝo:

Knabo maskita en „Kuker“-kostumo. (Kukeri, kukerludoj — bulgara popolkutimo plenumata de maskitaj kaj speciale kostumitaj junuloj, kiuj same estas nomataj „kukeri“.

La maskoj estas de zoomorfa speco — virbovo, virkapro, virŝafo, urso, koko. Laŭ la tradicia kompreno, la kukerludoj celas riĉan rikolton, sanon kaj fruktadon ĉe bestoj kaj homoj.

La historiajn radikojn de la kukerludoj oni trovas en la kulturo de la antikva (verŝajne traca) loĝantaro de la Balkana Duoninsulo.)

Ĉefredaktoro: Donĉo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimitar HAĜIEV, Krastju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MI-TEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado.
Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distro

Verdaj multjaruloj

Ce plantoj, samkiel en la mondo de bestoj, la daŭro de la vivo estas malsama. Paralele kun reprezentantoj de la flaŭro, kiuj vivas nur kelkajn tagojn, ekzistas arboj, kies longvivado egalas jarmilojn.

Tilio, ulmo kaj poplo ordinare vivas ne pli ol cent jarojn. Sed unu speco de tilioj en la Ambrolaŭra regiono de Kartvelio vivas jam tri jarcentojn. Ĝi estas alta 60 metrojn. Alia maljuna reprezentanto de tiu speco kreskas en la Talsin-regiono en Soveta Latvio kaj jam estas 400-jaraĝa. En Svaneti-montaro estis trovita alia tilio, kiu havas jam 700 jarojn.

Similajn multjarulojn oni renkontas ĉe ulmoj kaj poploj. En la rumana urbo Kimpulung-Moldovansk kreskas ulmo, kies aĝo, laŭ la specialistoj, superas 500 jarojn. En la Alzan-valo en Kartvelio estas du poploj-„ĝemeloj“ — jam 700-jaraĝaj.

Al la familio de arboj-multjaruloj oni aligas ankaŭ la kverkon, kiu ordinare vivas mil jarojn kaj eĉ pli. En Latvio, proksime de urbo Tukumsa, en la vilaĝo Kajva, estas kverko pli ol miljara kaj la ĉirkaŭmezuro de ĝia trunko estas 9,4 metroj. La plej maljuna konata kverko verdas en Soveta Litovio kaj estas 2000-jaraĝa. La ĉirkaŭmezuro de ĝia trunko estas 12 metroj.

Iam oni konsideris plej multjara arbo la baobabon en Orienta Afriko, kiu estas pli ol 5000 jarojn aĝa. Nun oni jam scias, ke ĝia rivalo estas la cedro en la japana insulo Jakusima — jam 7200 jarojn aĝa.

En Bulgario, en Pirin-montaro kreskas la fama Bajkuŝev-pinarbo“, samaĝulo de la bulgara ŝtato — pli ol 1300-jaraĝa, atestanto de multaj gravaj eventoj en la malkvieta historio de nia popolo.

La arboj-multjaruloj estas siaspecaj kronikistoj de ŝanĝoj en la klimato de la konkretaj regionoj de la Tero: al ĉiu jaro respondas unu cirklo de la horizontala tranĉo de la arbo-trunko, kiu havas difinitan figuron, laŭ kiu la specialistoj precizigas la karakteron de la klimato en la pasintaj jaroj.

Jam ekzistas specifa scienca branĉo — dendrokronologio, kiu aplikas plej modernajn metodojn de esploradoj kaj dank'al ili la dendrokronologistoj preparis la unuan en Eŭropo „dendro-kalendaron“ de 884 jaro ĝis hodiaŭ.

D. S. R.

SAGAJ KONSILLOJ

● Se vi volas vivi longe, ne mallongigu la vivon de la proksimuloj.

● Vi laboru eĉ senpage, sed ne restu vi senage.

RUZULO


Estas tempo de rikoltado de cerealoj. La juna filo kuŝas sub la ombro de iu arbo.
La patro: — He, sentaŭgulo, vi ne estas inda, ke la suno vin lumigu!
— Ja pro tio mi kuŝas en la ombro!

GRAMATIKO

— Diru Petro, kiel oni uzas la vorton „pantalono“, ĉu en singularo aŭ pluralo?
— Supre en singularo, malsupre en pluralo.

ANGULENIGMO

(en ambaŭ direktoj)



A — Edena; B — Virnomo; C — Kemia gasa elemento (Rn); C — Parto de molekulo; D — Rivero en Sovetunio; E — Aparato; F — Nomo de la litero Z; G — Mallongigo por ampero.

Movoj de la Kavaliro

AL	SIN	PE	TAŝ	KO	NA
TAN	★	NA	PLE	★	KUN
ĜE	MOZ	TO	SA	REŝ	MAL

Komencante per la silabo Al (nigreta), kaj laŭ la kavaliro movo en la ŝakludo, trovu konatan proverbon.